



GENERALA PLANO KAJ ENHAVO.



NUNTEMPAĴOJ : Morto de Generalo Trepof. — La Amerikanoj en Cuba — La universitataj festoj en Aberdeen — La londona Lord-Urbestro en Paris

LA GENÈVA KONGRESO : Koncertoj kaj festoj, de *Th. Rousseau*. La komerca ekspozicio, de *Steletto*

FANTAZIAĴO : Tio kio eblis okazi, de Fraŭlino *Agnès Bruno* (SKOTLANDO).

PRI ESPERANTO : Kroniko, Bibliografio

TURISMO : La Cedrarbaro de Teniet-el-Hâd, de *M. Mende* (ALĜERUJO)
La superversado kaj la Administracio, de *Alfred Capus*, Franca-Akademiano

SPORTOJ : Tra la Sportoj kaj Turismo, de *L. de Guesnet*

ĈIULANDA VIVADO : Vilaĝana movado en Gurujo, de *D^{ro} M. K.* (RUSUJO)

VIRINA PAĜO : La Korseto, de *D^{ro} Dumas* kaj *Roksano*

TEATRA PAĜO : La Vesta'ulino en Béziers ; Teatraj eĥoj, de *Johanino Flourens* kaj *J. Fize*, (FRANCUJO)

FELIETONO : Poŝta Amo, de *Johano Munoz* kaj *Pabon*, kaj *Johano Garcia Martin* (HISPANUJO).

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzaĵoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)
Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al :

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn, plenvalore.

Jara abono : 8 frankoj, ĉiulande. — Duonjara : 4.50 fr. — Kvaronjara : 2.25 fr. — Unu kajero : 0 fr. 75 c.

Nia Kristnaska Numero

enhavos rakontojn kristnaskajn el diversaj landoj kaj el diversaj epokoj, speciale verkitaĵoj por vi, legantoj niaj, de aŭtoroj el tiuj landoj; la sekvon de nia sprita felietono; la finon de l' kongreso, de l' pentrinda priskribo de l' Arbaro de Teniet-el-Hād kun dua artplena desegnaĵo, kaj de l' interesa artikolo de D^{ro} M. K. pri la grava vilaĝa movado en Gurujo. La virinoj trovas en ĝi sciigojn pri la vintra sezono, de nia malica Roksano; fine ĉiuj legos plezure facil = kaj bonegstan artikolon pri Islando de nia tre lerta samideano Th. el Islando, ano de l' Lingva Komitato; kaj poetan rakonton de nia fama hungara sa-

midcano Altenburger, kiu ĵus verkis gravan lernolibron por Hungaroj.

Interesa aldono estos dediĉita al la Junularo; ĝi enhavos, inter aliaj, tute ĉarman sceneton je du personoj, de l' konata franca literaturisto Berr de Turique; tradukon laŭ la pola lingvo, de Kabe, la talenta L. K. -ano, aŭtoro de « Pola Antologio »; delikatan rakonton « Ĉe la Soldatejo », de niaj samideanoj Ed. Teyssonneau kaj L. Rigoir; infanan paĝon, de Amatus.

Ni ne akceptas la respondecon de l' abonaj numeroj de « Tra la Mondo » perditaj de la poŝto. — Ni faras la adresŝanĝojn NUR laŭ peto AKOMPANATA DE 50 CENTIMOJ.

La manuskriptoj ne estas resendataj.

Oni povas represi niajn artikolojn kiam malpermeso ne estas speciale farita, sed oni estas petata ĈIAM CITI LA DEVENON DE l' ARTIKOLO, t. e. la nomo « Tra la Mondo », kaj sendi al ni ekzempleron de la traduko.

Nia militira Plano por 1907.

Ni havas en nia *trezorujo* valoran ŝtufon, kapablan kontentigi la plej postulemajn.

Ni daŭros atentiĝi por sekvi, tiom kiom eble, lanunon; ni kunmiksos, kiel en la pasinto, bildojn kaj tekstojn laŭ ĝusta proporcio, por konservi al « Tra la Mondo » ĝian allogecon tute taŭgan, kiel tre ofte oni ĝin skribas, por la propagando.

Al la sama celo, ni penados konservi en ĉiu numero sufiĉan internaciecon kaj ankaŭ ĝeneralecon. Okaze oni bonvolu rimarki kaj rimarkigi tiun duoblan karakteron, kiu montras, kune kun kaj la disvastiĝon de Esperanto en multe da landoj, kaj ĝian taŭgecon por pritrakti ĉiuspecajn temojn.

Niaj felietonoj.

Kiel oni povis rimarki, ni penadis apliki la principon de l'internacieco en nia literatura fako, kaj jam ni donis literaturaĵojn el multe da landoj.

Niaj felietonoj, *tute modernaj*, estis aparte interesaj, ĉu originalaj, kiel « Rememoroj », de *Kazi-Girej (Siberujo)*, kaj « Judith », de *F^{ino} Oxenford (Anglujo)*; ĉu tradukitaĵoj de konataj naciaj literaturistoj, kiel la drama « Toronto el Ŝaŭmo » de la fama franca verkistino *Daniel Lesueur* delikate tradukita de la tre lerta *J. Flourens*, kaj la sprita « Poŝta Amo », de l' talenta *Johano Munoz kaj Pabon (Hispanujo)*.

Ni publikigos dum la jaro 1907 « Tertremo », de *Amfiteatrov' (Rusujo)*, trad. de *Leo Belmont (Polujo)*, ano de l' Lingva Komitato; « La Repaciĝo », de *V. Jiskra*, trad. de *Emilie Lehnertova (Bohemujo)*; « Afrikaj leteroj », de *H. Sienkiewicz*, trad. de *S^{ino} Hulanicka (Polujo)*; « Kelkaj miroj en Nov-Jorko », de *E. Baff (Unuigitaj Ŝtatoj de Ameriko)*; « La Specialistoj », de *J. H. Salomon, (Holandujo)*; k. t. p.

Literatura kaj artista fako.

Sekvos unu la alian, en tiu rubriko; Vasiliso la Saĝega trad. de l' ruso, de *Romano Frenkel (Siberujo)*; la pentristo Veresĉagin, de *Kabanov (Rusujo)*; Sonnenthal, fama aŭstra aktoro, de *O. Simon*, L. K.-ano; pri la orienta muziko, de *Kolovrath (Rusujo)*; la pentristo Fragonard, de *Eugène Montrosier (Francujo)*; k. t. p.

Intermiksotaj kun literaturaĵoj: La Metamorfozo, de *Oreškova*, L. K.-ano (*Bulgarujo*); Aprila Fabelo, de *Pr. Bord (Francujo)*; Orientaj legendoj, de *Mihajlovski*, trad. de *G. Trikjetin (Bulgarujo)*; la glavo — el la Sentimentala Vojaĝo de *Stern* — trad. de *C. Snape (Anglujo)*; k. t. p., k. t. p.

Diversaĵoj, Ĉiulanda Vivado, aliaj rubrikoj.

Venos, ĉia ĉe sia loko: la Piloloj de D^{ro} Kohol, de *Hans Romanowicz (Aŭstrujo)*; Bulgara vilaĝa edziĝo, de *L^o Silvestriev (Bulgarujo)*; Japanaj rakontoj, trad. laŭ la anglo de *D^{ro} Gambier (Francujo)*. Scenoj de la popola vivo: rusa, de *Radvan Ripinski (Rusujo)*; itala, de *Gr. A. Gallois (Italujo)*; hungara, de *Arnold Gottl (Hungarujo)*; meksika, de *Morin (Meksikujo)*; nov-zelanda, de *Field (Nov-Zelando)* kaj *D^o Gambier*; sveda, de *P. Hedstrom (Svedujo)*; angla, de *Maréchal (Anglujo)*; k. t. p.

Priskriboj pri Bavarujo, de *K. Zacherl (Bavarujo)*; interesaj artikoloj pri la Sveda arĥeologio, de *J. Lundgren* kaj la sveda mitologio, de *Lindstedt (Svedujo)* k. t. p.; sciencaj artikoloj, sportoj, k. c...

Ni ne forgesu, fine, nian enketon pri edukado, por kiu respondoj daŭras alveni de ĉiulande.

Oni povas vidi ke l'intereso de « Tra la Mondo » ne malgrandiĝos. Niaj legantoj penadu, siaflanke, pligrandigi ĝian abonantaron.

« TRA LA MONDO ».

Oni bonvolu legi la kovrilajn sciigojn!

Ni ricevas ofte leterojn tute sen serioza kialo: ekz. por nin demandi kiel oni povas pagi reabonon; ĉu ni akceptas poŝtmarkojn por pago de apartaj numeroj de « Tra la Mondo »; por peti adresŝanĝojn ne aldonante la necesan sumon, k. t. p.

Ni ĉiam penadas respondi al tiuj demandoj, sed tio kaŭzas al ni grandajn temperdon kaj monelpezon.

Ni petas ke oni bonvolu ĉiam legi la kovrilajn sciigojn kaj kiam oni skribas pri serioza afero, oni bonvolu ĉiam aldoni la respondan poŝtmarkon.

« T. L. M. »

Nia enketo pri edukado.

Daŭras alveni la dokumentoj: de Japanujo, Insuloj Tahiti, Siberujo... Aliaj estas anoncitaĵoj de Danujo, Islando, Grekujo, Alĝerio, Japanujo, Nova-Zelando, k. t. p.

Ni petas niajn amikojn bonvoli rapidiĝi tiom, kiom eble la sendon de l' dokumentoj esperigitaĵoj.

Estas malfermita, la 1^{an} de Oktobro 1906^a, « Librairie de l'Esperanto » (librejo de Esperanto) kies direktoro, juna kaj agema, S^o G. Warnier, plenumos rapide kaj akurate ĉiujn mendojn. Li tuj sendas la tre plenan katalogon de l' Esperantaj presaĵoj akireblaj en sia firmo. (46, Rue Sainte-Anne, Paris.

NUNTEMPAĴOJ



GENERALO TREPOT.

La universitataj festoj en Aberdeen.

Oni ĵus solene festis, en Aberdeen, la kvarcentan datrevenon de la fondo de ĝia fama Universitato.

Ĝi estas bela konstruaĵo, rimarkinda pro kvadrata turo alta je kvindek tri metroj, subportanta kupolon multe traboritan kiu reprezentas kronon; ĝi enhavas bibliotekon riĉan je maloftaj libroj, altvaloraj manuskriptoj, kaj belan muzeon.

Eminentaj profesoroj, talentaj francaj literaturistoj partoprenis en la ceremonioj. Inter aliaj, S^{ro} Jules Claretie, de l' franca Akademio varme salutis la noblan Universitaton de Aberdeen, «unu el la grandaj iniciatintoj de l'homa progreso.»

La Londona Lord-Urbestro en Paris.

En la mezo de l'Oktobra monato, la Londona Lord-Urbestro kun anoj de l' County-Council (Urb-Konsilantaro) vizitis urbon Paris.

Ĉar la vizito estis tute oficiala, la Lord-Urbestro kaj lia multnombra sekvantaro survestis riĉajn mezepokajn kostumojn, kiuj estas unu el la ĉefaj privilegioj de iliaj oficoj.

Aparte rimarkata kaj admirata estis la fama kaj riĉornamita solena kaleŝo de l' Lord-Urbestro.

Morto de Generalo Trepof.

La homo, kiu estis sin iginta la atentege gardanto de la imperia familio Rusuja kaj aliformigis la Peterhof'an palacon en ne almilitebla fortikaĵo, mortis. Suferanta de longe pro kormal sano, lia stato malplibonigis pro la malfavoro, en kiu li troviĝis de kelke da tempo apud la Caro. Estas kurioze konstati ke lia malkredito devenis de liberaj emoj, antaŭ nelonge elmontritaj de li, meze de l' Konsilantoj de l' Caro, kiuj, kontraŭe, predikis por la senkompata repremado, kiu tiel longe konsistigis lia politiko.

La situacio en Rusujo estas ĉiam malkvieta. Unu grava fakto de l' lastaj tagoj estas la forlaso, de Caro, de granda parto de siaj personaj bienoj.

La Amerikanoj en Cuba.

Nova kaj grandega revolucio, kiu, de ses semajnoj, agitegis insulon Cuba (Kuba) finiĝis per la intermeto de U. Ŝ. A. kaj la elŝipigo de Amerika korpuso.

S^o Taft, sendita kiel pacigonto de S^{ro} Roosevelt, malsukcesinte pri sia misio, deklaraciis la protektadon de U. Ŝ. A. por l'insulo, kaj proklamis sin kiel provizora guberniestro.

Li konigis ke la intenco de lia lando estas nur restarigi kvietecon kaj pacon en Cuba, sen ia ajn intenco konservi la insulon. Ŝajnas efektive ke la U. Ŝ. A. ne estas dezirantaj refari la koston provon kaj la malfacilan almiton je Philippines (Filipin').

La drono de « Lutin ».


Pro nekonata, kaj eble nekonota kaŭzo, la submara ŝipeto « Lutin », dum subakviĝo, iris funden de l' maro, ne povante reiri suprajn.

Je tiu bedaŭrinda okazo, la dua de unu jaro, la franca ĵurnalo « La Petite République » opinias ke estus dezirinde ke, dum la estonta Haga konferenco, la militaj nacioj interkonsentu por forlasi uzon de submaraj ŝipoj, kiel ili jam interkonsertis pri forlaso de l' eksplodeblaj kugloj.

Atendante tiun dezirindan rezulton, ni respekte salutis la suferintoj de l' homa detruemo.

« T. I. M. »





LEMANA LAGO.

La Genèva Kongreso

KONCERTOJ KAJ FESTOJ.

La Festeno.

Merkredon, je la tagmezo, okazis granda oficiala festeno en kiosko Bastions.

La kongresanoj sidigas ĉe la multnombraj tabloj, baldaŭ plenaj, ŝirmataj kontraŭ la varmegaj sunradioj per granda tendo kaj per la arboj de la promenejo. Ili grupiĝas laŭ siaj inklinoj, ĉiu serĉante siajn alilandajn konatulojn aŭ korespondantojn. Kaj baldaŭ, la anaro iĝas bruega. Ĉe ĉiu tablo, la plej diverslingvaj gastoj, Angloj, Francoj, Svisoj, Germanoj, Rusoj, Poloj, Finnoj, Bohemoj, k. t. p. babilas frate, per nia belsona kaj mirinda lingvo. Kaj ankaŭ, ĉar la apetito estas pligrandigita de la plena aero, la kummanĝantoj ne malŝatas la menuon, kies enhavo estas: *Antaŭmanĝaĵoj diversaj; Fisaĵo kun Genèva saŭco; Lardumila lumbaĵo; Legomoj; Svisa fromaĵo; Diversaj desertoj; Zamenhofaj biskeitoj (neniu vidis ilin); Sezonaĵoj fruktoj; Vinoj.*

Ĉe la deserto parolas sinsekve: D^{ro} Zamenhof, kiu toastis je la organizintoj de la 2a kongreso; generalo Sebert, je la nomo de la francaj scienculoj; S^o Boirac kiu trinkas je la junuloj kaj je la disvastiĝado de Esperanto inter ili, instigante la patrinojn naski multe da idoj; S^o Schneeberger, prezidanto de la kongreso, salutas la reprezentantojn de la tutmonda esperantis-

taro; S^{ro} de Beaufront prezidanto de la S. f. p. E, unu el la unuaj apostoloj de Esperanto, memorigas la malfacilan komencon de nia afero, konsiderita dum multe da jaroj kiel utopio, kaj nun proksima je la fina sukceso. Tiun elokventan paroladon oni varmege aplaŭdas.

Poste parolas S^{ro} Montrosier, je l' nomo de l' lingvanoj ne reprezentataj en la kongreso, kies sentojn li konas per la korespondado, kiun li havas kiel redaktoro de « Tra la Mondo »: varmegaj por Esperanto, amemaj por D^{ro} Zamenhof;

Küchler (Germano), Lambert (Anglo), generalo Ayza (Hispano), Maréchal (Anglo), Tellini (Italo), Jamin (Belgo), D^{ro} Bein (Polo), D^{ro} Bernard kaj Schmid (Svisoj), Michaux (Franco) k. c. La orkestro Estudiantina ludas siajn plej bonajn muzikaĵojn dum la festeno; kaj kiam la esperantista himno *La Vojo*, kaj *Arbarkanto* muziko kaj paroloj de Schneeberger estas ludataj, la tuta ĉeestantaro kunkantas.



LA GENÈVA TEATRO.

Ĉe la Teatro.

La vesperon de tiu tago, en la Granda Teatro tute plena, okazis literatura, muzika kaj drama reprezento.

En la centra loĝio, ĉiam entuziasme aplaŭdata kaj respektige salutata, sidigas D^{ro} Zamenhof.



Oni multe aplaŭdas la *Letero de Rekomendo* el Max Maurey tradukitan de S^{ro} Warnier kaj sprite ludatan de Sroj Leono Zamenhof (Polo), Bourlet (Franco) kaj Pujula y Valès (Katalano). Grandan sukceson havas ankaŭ la gekantantoj kaj la gedeklamantoj: S^{ino} Guivy nia lerta esperantista muzikverkistino *; F^{ino} Zabilon d'Her, kies voĉo estas tiel dolĉa; F^{ino} Perrin; F^{ino} Farnes kaj S^{ro} D^{ro} Hanauer kiuj belete kantis dueton el la Edzafesto de Figaro, de Mozart, tradukitan de S^{ro} Hanauer; S^{ro} Joffe-Beretta, kiu kantas tiel bone kiel istino kaj kiu devis reveni dufoje sur la scenejon; S^{ro} G. Chavet kiu mirinde kantis sian spritan kanteton pri la Boulogne'a kongreso, en franca lingvo; S^{ro} Lambert kiu dramece deklamis la teruran poezion de Edgard Poe, la korvo, de li trad.

La plej bonan lecionon de elparolado donis al ni S^{ino} R. Junck kaj S^{ro} Privat. El iliaj buŝoj nia belsona lingvo havas sian tutan ĉarmon, sian tutan dolĉon; kaj ankaŭ pri la verke-to mem de De Amicis, bonege prezentita de niaj okazaj akto-roj, oni povas nur laŭdi la korduŝan temon, la delikatecon de la sentoj.

Oni scias, ke oni ludis tiun teatraĵon en Romo post la lasta elsputo de Vezuvio, en bonfara festo organizita por havigi monon al la suferantoj de tiu malfeliĉego. La malgajeco de tiu verko tute taŭgis por tiu cirkonstanco. Sed, eble, niaj ĝojaj samideanoj estus multe pli ŝatintaj amuzan kaj vivplenan komedion, kiu ne estus lasinta en ilia koro, ĉe la eliro de tiu interesa vesper-festo, senton de dolora korpremo, kiel certe lasis *La Floro de l' Pasinto*.

La Tago de Vevey.

La sekvinta tago estis eble la plej bela tago de la Kongreso. *Winkelried*, unu el la plej grand-



Tra festa tago.



(Fot. de Sinjoroj Stroele kaj P. Candron).

1. SUR LA STRATO.

2. SUR LA FERDEKO DE L' WINKELRIED.

3. LA FAMA KANTISTO DE VEVEY EN KOSTUMO ARMAILL'A.
CASTELLA.

4. LA MUZIKANTARO DE VEVEY ANTAŬMARSANTA ANTAŬ LA
KONGRESANARO.



aj ŝipoj de la lago Lemano, plenege je kongresanoj, kun la verda esperantista flago flirtanta super la ĉefmasto kaj, malantaŭe, apud la svisa flago, forlasis Genèvon je la oka mane kaj alvenis en Vevey je la dekdua.

Antaŭirata de la muzikistaro *La Lyre de Vevey*, la sekvantaro de niaj samideanoj laŭiras la ĉefan straton de la urbo, kaj sin dividas je du partoj, kiuj iras por tagmanĝi, unu en la hotelon de Anglujo (d'Angleterre), la alia en tiun de la tri kronoj (Trois Couronnes). La du cambregoj estas plenegejaj.

La festeno estas prezidata en la hotelo de la tri kronoj de D^{ro} Zamenhof. Je la nomo de la urbestro de Vevey, Sroj Von der Aa kaj Couvren diras bonvenon al la kongresanoj. Poste, oni aplaŭdas la alparolojn de D^{ro} Zamenhof, S^{ro} Junck, Sroj Coniasso (kies paroladon ni tute ne komprenis, ĉar li havis la bedaŭrindan ideon paroli itale), Bourlet, Cart, D^{ro} Bein, Pourcines, direktoro de *l'Impartial de l'Est*, en Nancy, kiu parolis je la nomo de la gazetistaro. Oni aprobas la tekston de telegramo al S^{ro} De Amicis, aŭtoro de la teatraĵo ludita la antaŭan tagon.

En Hotelo de Anglujo, S^{ro} de Beaufront prezidas. S^{ro} Ledermann alportas la saluton de la urbo Vevey. Poste, belega parolado de S^{ro} de Beaufront estas longe aplaŭdata de la tuta ĉeestantaro. Paroladas ankaŭ, S^{ro} D^{ro} Hanauer, Nylèn, F^{ino} Zabilon d'Her.

Post la festeno oni trinkas kafon en la ĝardeno de la hotelo de la tri kronoj, dum la Lyre de Vevey faras koncerton; S^{ro} Castella, el Vevey, vestita kiel la svisaj paŝtistoj (armaili), elparolu: armaji, kantas per mirinda kaj fortega voĉo la svisan kanton *Le Ranz des Vaches*, kiun la Svisoj, kaj eĉ la alilanduloj, kiuj komprenas la poezion de la montara vivado, neniam aŭdas sen korduŝeco.

* Aŭtorino de *En sonĝo, Himno, Ho mia kor'*, *La du Muloj, Birdoj forflugu*, aĉeteblaj ĉe la Presa Esperantista Societo.

Kaj tiam ankaŭ, en tiu ĝardeno de l' hotelo, ĉe la lagbordo okazis fakto, kiun ĉeestis nur malgranda aro da personoj, sed kiu malsekigis la okulojn de multe da ili. Du blindaj fraŭlinoj alportis sian respektplenan saluton al D^{ro} Zamenhof, por lin danki pri la bonfaroj, kiujn Esperanto alportas al la biinduloj. D^{ro} Zamenhof kore kisis ilin kaj la junulinoj, ne povantaj lin vidi, kaj tamen dezirantaj havigi al si ian ideon pri lia persono, respektate palpis lin per la manoj. Certe tiu esprimo de dankeco kaj amo al li, trege kortuŝis nian karan majstron.

Je 4 h. 45, Winkelried forlasas Vevey kaj alvenas en Genèvon je 8 h. 15. Ĉe la elŝipigo, inter du linioj da kongresanoj kaj da vidvolemuloj, D^{ro} Zamenhof, antaŭita de la esperantista flago, preteriras, entuziasme kaj kore ovaciata.

Pri la ŝipveturado, oni ne povas paroli tro laŭde. Malvarmeta venteto forpelas el la memoro la lacigan varmecon de la antaŭtago en Genève. La ĉielo estas mirinde blua kaj la akvoj de la lago, nature verdaj, jen prunteprenas al ĝi ĝian koloron, jen tremante briletas sub la oraj radioj de la suno. La blankaj mevoj sekvas nian ŝipon malalte super la fluida ebenajo, kaj iliaj malfalditaj flugiloj, ricevante de malsupre la rebrilon de la ondoj, ŝajnas tiom da verdeblankaj punktoj, kvazaŭ la rebrilo venus el nia



Fot. P. Caudron.

KORTUŜANTA SCENO.

Dro Zamenhof kaj la Blindulinoj.

verda flago mem. Kaj malproksime en la fundo de la lago, la altaj montoj, malheligitaj de nebuleto, kaj dronigantaj siajn malsuprojn en la lago, la potenca Dento de l' Sudo (Dent du Midi), kiu fermas la vidaĵon, la rozkolora pinto de Monto Blanka, kiu sude altiĝas super la montoj de Savoie, fojmas naturscenon tute neforgeseblan.

En tiu belega tago, la kongresanoj multe ĝuis ankaŭ la intiman vivadon de tiu okhora ŝipveturado. Oni aĉetas multe da poŝtkartoj eldonitaj de S^{ro} Caudeville kaj la belan portreteton de D^{ro} Zamenhof; kaj nia majstro sen ia malpacieneco, kun afabla kaj bonkora rideto, bonvolas subskribi la poŝtkartojn kaj la portreteton, kiam oni tion petas de li.

Oni multe babiladas sur la ŝipo, kaj ĉiuj rimarkas kiel rapide oni plilertigas en la elparolo de nia lingvo. Oni prezentas unu la alian, oni interŝanĝas vizitkartojn. Sed ankaŭ oni interŝanĝas ideojn kaj sentojn, kaj vi povas esti certa, ke dum tiuj ĉi memorindaj horoj, multe da amikoj fariĝas, kiuj amikoj restos, dum la tuta vivo.

TH. ROUSSEAU.

Ni donas ĉi sube la du alparolojn, kiuj malfermis la kongreson, kaj kiujn ni ne povis enpresi pli frue pro manko de spaco.

Parolado de Generalo Sébert.

« Je la nomo de l' internacia komitato elektita de la unua universala kongreso pri Esperanto, okazinta en Boulogne-sur-mer en 1905, mi havas la devon kaj l'agrablan mision danki tie ĉi ĉiujn, kiuj kunhelpis por l' organizado de l' nuna kongreso.

Estu do permesata al mi esprimi nian profundan dankecon, antaŭe al la Svisa esperantista Societo, kiu decidis pri la elekto de Genève, por la okazado de l' dua universala kongreso pri Esperanto, poste al la loka komitato, kiu prenis sur sin la tutan ŝarĝon de la preparado tiel plena kaj tiel malfacila de tiunatura kongreso, kaj speciale al ĝia sindona prezidanto, S^o Edouard Bernard, kiu ĝian direktadon akceptis, (aplaŭdoj) kaj al ĝiaj junaj kaj sindonaj kunlaborantoj, inter kiuj mi ne povas deteni min ĉiuj, unuavice, ĝian ĝeneralan sekretarion, la junan kaj fervoran S^{on} Edmond Privat, kiu jam tiom faris por la propagando de Esperanto en tiu ĉi lando. (Varmaj aplaŭdoj).

Ni estas feliĉaj vidi kiam sukceso estas de nun certigata, dank'al ĉiuj tiuj penadoj, por tiu dua kongreso, kiu portos, en la Historio, la nomon de la granda kaj bela urbo Genève, tiu urbo gastema inter ĉiuj, tiel inteligente akirita, frue, por ĉiuj noblaj entreprenoj, kiu tiom da fojoj utilis kiel militkampoj por la bataloj de la penso, kaj kiu vidos, ni ĝin esperas, dum tiuj belaj tagoj dank'al la genia elpenaĵo de D^{ro} Zamenhof lumi, denove, je l'horizonto de l' homaro, la matenuro de epoko el paco kaj el frateco universalaj. »

Tiuj paroloj, kiuj tiel elokvente tradukas la esperojn de ĉiuj ĉeestantaj Esperantistoj, estas longe kaj kore aplaŭdataj.

Parolado de Rektoro Boirac.

Poste levigas Rektoro Boirac, kiu, kun tiel granda distingeco, prezidis la Boulogn'an kongreson.

Memoriginte la sukceson de tiu lasta kongreso, ŝuldata grandparte al la aktiveco kaj sindonemeco de S^o Michaux, la oratoro montras la gravan rezultaton akiritan per tiu unua universala kunveno de Esperantistoj, kaj tiun espereblan de la dua :

« Ĝi donis al ĉiuj Esperantistoj plej diversnaciaj la konscion de ilia unueco kaj frateco en ilia komuna interligilo Esperanto; sed ĝi pruvis ankaŭ al la skeptika publiko, ke nia lingvo ne estas simpla amuzaĵo, kvazaŭ ludilo, sed praktika kaj vivoplena kreaĵo, per kiu povas interkompreniĝi ĉiuj homoj, malgraŭ la malsameco de siaj naciaj lingvoj. La dua kongreso certigos por ĉiam tiun duoblan efikon. Ĝi plifirmigos la Esperantistojn en ilia fido, kaj ĝi enigis pli profunde en la publikon la konvinkon, ke nia ideo estas utila kaj fruktoplena por la estonto de la homaro. »

Post aplaŭdoj la aŭtoro malkomencas per tiu elokventa fino.

« La lastan jaron Esperanto, kiel aglo vizitonta la tutan mondon, ekflugis el la marbordo de Boulogne: ĝi sin portas nun super la Alpoj, montegoj, kies pintojn la suno lumigas al la granda Genèv'a respubliko: tiel plenumiĝas la profeta deziro de Zamenhof:

En la mondou venis nova sento
Tra la mondo iras forta voko
Per flugiloj de facila vento,
Nun de loko flugu ĝi al loko. »



Fot. Egli.

LA WINKELRIED IOM ŜARĜITA !

Ni estas devigataj prokrasti la enpreson de nia paĝo « Miksaĵoj », kaj de l' plena rezultato de nia konkurso. La gajnintoj estas : S^{roj} Warden, Baequet kaj Rigoir. Detalojn ni donos en la venonta numero.

La Kongresa Ekspozicio.

Je la pentrinda propaganda vidpunkto, ĝi estis malpli interesa ol tiu de Boulogne-sur mer; mankis objektoj similaj al la dokumentoj senditaj de kelkaj grupoj, inter aliaj de St Omer kaj Paris, kaj precipe al la tiel rimarkinda ekspozicio, paciencie kolektita de nia ĉefredaktoro kiam li estis en Alĝero, kies parto apartenis al la ĉi tiea grupo, kaj parto al li mem; kolekto kiu per si mem plenigis la du vastajn ŝtuparojn, de l' Boulogna teatro por dokumentoj zorge komentariitaj.


Sed la ekspozicio estis pli plena je la komerca vidpunkto, la ĉefa laŭ ni, ĉar ni devas pli kaj pli celi la eniĝon de komercistojn niajn rangojn. Mi parolos nur rapide pri la ekspozicio de libroj kaj revuoj, sidanta maldekstre. Ĝi estis sufiĉe plena. Specialan citon ni faras por la tabeloj Delmas, kies Esperanta teksto estas ŝuldata al S^o de Beaufront, prez, de S, f. p. E. (sciigojn ĉe la eldonisto: S^o Delmas, 10, Rue Saint-Christoly, Bordeaux France); por la nova librejo de Esperanto, 46, Rue S^o Anne, kiu prenos sur sin la tenejon de libroj forlasotan de P. E. S., por la bela ekspozicio de « Tra la Mondo », kies binditajn volumojn oni admiras. La ruĝa kovrilo de « La Revuo » altiras la okulon; kontraŭe oni rimarkas kaj komentarias la malĉeestadon de « Lingvo Internacia », kiu, la lastan jaron, ankoraŭ ludis tiel gravan rolon!

En la propagando fako, ni citos la faman ŝlosilaron de Ĉefeĉ, enhavantan jam la crojn anglan, francan, germanan, hispanan, italan, svedan; kaj la « Tuto Esperanto » ekzistanta jam angle kaj france, ekzistota baldaŭ — esperinde — ailingve; diverspecajn poŝtkartojn, inter kiuj multe plaĉas tiuj, malkaraj, de « Tra la Mondo ». Ni citu ankaŭ l'afison de l' grupo de Versailles, kaj la praktikajn surskribojn: Vortojn Esperanto kaj stelojn, facile surglueblajn sur vitrojn. Ili estas tute difinitaj por Esperantaj vendejoj, librejoj, konsulejoj, k. t. p. (sciigojn ĉe l'elpensinto: S^o C. P. Kuchler, Bethmannstr, 50, Frankfurt a/Main, Deutschland.

En la fako nutrada estas multaj produktaĵoj je la marko Esperanto, aŭ prezentitaj per Esperantaj prospektaj, de la antaŭmangoj — kiel haringoj Duchauchois — ĝis deserto kaj vinoj.

Ni scias ke la kuracistoj multe ŝatas la vinojn de sia kunfrato D^o A. Vesoux (Beaune), kies multaj iĝis fidelaj klientoj. Ankaŭ iuj, kiuj ĝin konas, ne plu volas trinki alian ĉampanvinon ol tiu de nia fervora amiko Jadeau (Mercurly Saône et Loire, France). Kaj, sen ia intenco riproĉa, estas tute bedaŭrinde ke la organizintoj de l' kongresaj festoj ne pensis aŭ sukcesis enirigi la « Mirinda » kaj aliajn Esperantajn en la menuojn de l' festenoj.

Tio estis bonega okazo por kuragiĝi niajn samideanojn emajn reklamadi per Esperanto, t. e. por Esperanto. Tion oni tute forgesis, kaj S^o Jadeau skribis al mi, iom melankolie: oni trinkis ses botel-



Fot. D^r Dor.

ELSIPiĜO EN VEVEY.

Nia flagriĉa antaŭgardio.

ojn da « Mirinda » dum la festeno ĉe « Les Bastions » ...ĉar mi mem ilin donacis al miaj najbaroj, pagante profiton al la kafejestro! Vere iliaj delongaj oferoj por Esperanto, la arta elmonro de ilia vino, kun ĉampanbareleto meze de boteloj, meritis pli da sukceso. Ni esperas, ke niaj anglaj amikoj ne flankalos tiun praktikan fakon de nia afero, kaj ke, kiel en Boulogne, havos lokon en la programoj la Esperantaj komercaĵoj, ĉu en la festenoj, ĉu ĉe la restoracioj kaj leotrinkejoj.

Multaj el ni estus dizirintaj, ankaŭ, povu trinki ie « L'Espérantine », tiun malnovan digestivan likvoron, kies beleta multkolora prospekto rakontas la devenon. La boneco de la likvoro, la beleteco de l' botelo, estas bonaj propagandiloj por Esperanto.

Eĉ la prospekto sola bonege taŭgas por montri al komercistoj varbotaĵoj, ke, jam, oni uzas Esperanton komerce. « L'Espérantine » devas troviĝi apud glasetoj sur la likvora pleto de ĉiu Esperantisto, kiu tute ne forlasis alkoholon, almenaŭ kiam li akceptas gastojn. (Ĉe S^o Brunon-Chauvet, Saint Etienne, France).

Inter la diversaj objektoj, unu el la plej rimarkataj estis la poŝhorloĝo « L'Espero » kun la devizo « Per Esperanto al amikeco inter ĉiuj popoloj de la fabriko Auréole en La Chaux-de-Fonds (Suisse). Konigi la horon al ĉi ajn, per tiu horloĝo, estos nova propaganda ago. Antaŭ la jam konata « Viksol » oni ankaŭ haltis interese. Tiu kurioza aparato havas propran karakteron: ĝi resanigas la malfeliĉan astmulon definitive. Kaj la sindikato Viksol estas tiel certa pro tio, ke ĝi sendas senpage la aparaton al malsanulo, kiu pagas nenion se li ne estas resanigita.

La artoj estis amplekse reprezentataj: Pentrarto, de l' portreto vivplena, pentrita en Boulogne-sur-mer, de nia talenta samideano, Felix Moseheles, prez. de l' Londona grupo, kaj eminenta pacifisto; Skulptarto, de la statuoj de S^o Schafenbühl, konata de niaj legantoj, kaj de alia helmova alegorio de S^o Ernest Legrand, granda Roma premio; fine muziko, de multaj konataj verkoj, inter kiuj, tiuj aŭditaj dum la kongresaj festoj: « La Espero » de F. de Ménéil, pri kiu ni jam parolis, tre bela kun kvarvoĉa aranĝo (1 fr. ĉe A. Fjodorov, Moskva Rusujo. str. Nikitskaja, domo de la konservatorio); la « Marŝo de l' Esperantistoj » de R. Deshayes, bonega kantita de S^o Guivy en la teatro, k. t. p.

La artoj estis amplekse reprezentataj: Pentrarto, de l' portreto vivplena, pentrita en Boulogne-sur-mer, de nia talenta samideano, Felix Moseheles, prez. de l' Londona grupo, kaj eminenta pacifisto; Skulptarto, de la statuoj de S^o Schafenbühl, konata de niaj legantoj, kaj de alia helmova alegorio de S^o Ernest Legrand, granda Roma premio; fine muziko, de multaj konataj verkoj, inter kiuj, tiuj aŭditaj dum la kongresaj festoj: « La Espero » de F. de Ménéil, pri kiu ni jam parolis, tre bela kun kvarvoĉa aranĝo (1 fr. ĉe A. Fjodorov, Moskva Rusujo. str. Nikitskaja, domo de la konservatorio); la « Marŝo de l' Esperantistoj » de R. Deshayes, bonega kantita de S^o Guivy en la teatro, k. t. p.

STELETO.



Fot. Ducommun.

LA ESPERANTISTA AMASO EN VEVEY.



Fot. D^r Dor.

SUR LA ŜIPO.

Princo hinda subskribanta sur la memorlibreton de Fraŭlino Lilian Holl.



Tio kio eblis okazi.

De Fraŭlino AGNESO BRUNO (Skotlando).

Ĉe Genève ili sin renkontis unu la alian. Li estas Skoto, kaj ŝi Hispanino.

La granda internacia Kongreso esperantista estis jam komencinta sian prikonsiliĝon, antaŭ ol tiuj du ĝejnuloj eĉ vidis sin reciproke.

Tamen, dum la festeno en « Les Bastions » ĉe kiu oni honoris ĝoje la gloran kreinton de la mirinda lingvo nova, Aleĉjo Makdonald sin trovis sidanta apud Ruso je sia dekstra flanko, kaj aliflanke apud malgranda olivkolora fraŭlino, kies belaj nigraj okuloj bri is hele. Ŝi kredeble ne havas pli ol dek ses jaroj, pripensis Aleĉjo.

La Ruso estis profunde priokupata, interparolante kun sia dekstra najbaro; kaj, ĉar Aleĉjo trovis sian silenton enuiga, li sin turnis al la knabino.

« Ĉu plaĉas al vi la Kongreso, fraŭlino? »

« Ho, ĝi tre plaĉas al mi, sinjoro. Mi ĉeestis ĉe ĉiuj kunvenoj en la teatro, kaj mi ĝuegis la vesperajn koncertojn. »

« Ĉu vi estas tie ĉi sola? Mi supozas, ke ne. »

« Ho, ne; miaj gepatroj venis kun mi. Sed ili ne scias Esperanton; tial ili min permesis veni sola al la festeno, kaj ankaŭ mi iros al la balo. »

« Tute sola? » ekkriis Aleĉjo.

« Ho, ne, mi estos akompanata de miaj gepatroj. »

« Nu, eble mi vin vidos tie? » diris Aleĉjo, varme parolante. « Mi estas tie ĉi tute sola. Mi venis el Skotlando. El kiu lando vi estas, fraŭlino? »

« Mi estas Hispanino, sinjoro. »

« Ho! tiel malproksime. — Ĉu mi povas esperi danci kun vi hodiaŭ vespere? Mi konos neniun ĉe la balo, kaj mi sentos... nun, la solecon. »

« Al mi tre plaĉos danci kun vi, sinjoro. »

Post la finiĝo de la festeno, Aleĉjo, promenante tra la apuda ĝardeno, revidis sian junan amikinin, kiu sidas inter sinjorino kaj dika sinjoro kvindek-jara. Pasante antaŭ ili, li levis sian ĉapelon, kaj la fraŭlineto lin salutis kun rideto kaj ruĝiĝo.

Je la naŭa de tiu ĉi nokto, alvenis en la dancejon nia Skoto vestita en sia nacia kostumo — kilto, plajdo, « Glengarry » ĉapo k. t. p. Li iris de unu ĉambro en alian, serĉante sian amikinin, sed unue li ne sukcesis trovi ŝian postsignon.

Kiam ekludis la muzikistaro, kaj en la dancsalonon rapide iris ĉiuj Esperantistoj, Aleĉjo eniris kune kun la homamaso. Sed li sentis sin malĝoja kaj sola.

Li staris apud la pordo, kaj liaj rigardoj ĉirkaŭvagis al la sinjorinoj gajvestitaj — unuj en iliaj naciaj kostumoj, aliaj en la kutima vesperkunvena vestaĵo.

Subite Aleĉjo ekremis. Ne malproksime de li, li ekvidis la samajn dikajn geedzojn, kiujn li rimarkis pli frue en la ĝardeno; kaj inter ili fraŭlinon en basko mallonga kaj brustoveŝto palkolora, ŝiaj haroj aranĝitaj en multaj kaj ellaboritaj intertordoj. Ĉu tiu ĉi povas esti lia malgranda Hispanino, vestita en sia kostumo nacia? Ĉe tiu momento, la knabino turnis la kapon, kaj li vidis ŝiajn belajn okulojn.

Per du paŝegoj li trairis la ĉambron, kaj salutis malalte antaŭ ŝi.

« Bonan vesperon, fraŭlino. Ĉu mi povas havi la honoron danci kun vi tiun ĉi valson? »

« Plezure, sinjoro. Sed unue permesu ke mi vin prezentu al miaj gepatroj. Sed ili parolas nur hispane. »

La gesinjoroj salutis kaj ridetis. Aleĉjo kaj ili ne povis interŝanĝi unu vorton. Tiam la ĉarman fraŭlineton Aleĉjo forkondukis triumfe.

Kaj tiel tio komencis.

Ili dancis kune preskaŭ la tutan vesperon, kaj la sekvantajn tagojn dum la Kongreso ili ofte sin renkontis ĉe la kunvenoj aŭ koncertoj.

Kaj kio poste? Aleĉjo reiris hejmen al Skotlando kaj lia malgranda Mario al sia suna Hispanujo.

Kaj ĉu tio tute tiel finiĝis? Ne, ĝi ne finiĝis tiam. Ĝi ne estis la « amo dum unu monato, unu semajno, unu tago » pri kiu kantas la poeto.

En sia malvarma norda lando, Aleĉjo pensis preskaŭ senĉese pri sia helokula fraŭlino.

Ili estis promesintaj interŝanĝi vidaĵpoŝtkartojn, kaj faris tion.

Pasis unu jaro; poste, du, tri, kvar. Dum tiu tempo Aleĉjo estis tre prosperinta. El malriĉa studento li fariĝis kuracisto praktikanta vaste ĉe la Londona « West-End ». Unue li estis nur helpanto de bonkonata maljuna kuracisto. Tiu ĉi, mortante post kelkaj jaroj, testamentis al Aleĉjo sian klientaron antaŭ longe fonditan.

Kaj nun Doktoro Makdonald sentis, ke li bezonas libertempon, kaj longan. Li nun havis fidindan helpanton; tial, lasante tiun ĉi zorgi pri siaj aferoj, li ekiris Hispanujon.

Li celis rekte al la urko Burgos, kie estas la hejmo de lia malgranda kongresa fraŭlino.

Li konis ŝian adreson. Sed estis pasintaj du jaroj, de la tempo kiam li estis ricevinta ŝian lastan poŝtkarton.

Li veturis tage kaj nokte. Ĉar li vojiris por la longe esperita vojaĝo, kiu estas nun realaĵo, li sentis ke li ne povas halti. Fine li atingis la urbon, kaj la domon. Sed tiu ĉi estis tute fermita, kaj la rulkurtenoj malsuprentiritaj. Tio estis nur lia unua frapo.

Ĉe la plej proksima domo li demandis pri la Gesinjoroj Martinez, kaj sciigis ke ili estas foririntaj de la urbo. Kaj la fraŭlino?

Ho! ŝi edziniĝis antaŭ pli ol unu jaro. Ŝi nun loĝas en Logrono, je cent kilometroj de tie ĉi.

Edziniĝinta! Mario edziniĝinta, *ha* Mario!

Post unu semajno Aleĉjo revenis Londonon. Liaj amikoj kaj malsanuloj tuj rimarkis strangan aliĝon ĉe li. Ŝajne lia antaŭa knaba gajeco tute neniĝis dum tiu mallonga foresto.

Kaj kial tio? La fraŭlino malplenumis nenian promeson.

Neniam li diris al ŝi eĉ unu aman vorton. Tamen li supozis, ke ŝi ĉerte scias, ke li ŝin amas, kaj ke ŝi sentas ankaŭ, ke ili estas korligitaj unu al la alia.

Sed vivado estas ĉiam plena je surprizoj kaj la homa naturo estas ŝanĝema; tial ni senprokraste devas efektiviĝi niajn dezirojn; aŭ alie, eĉ sen la scio de ni, la sorto nin disrevigos, kaj, kiel en tiu ĉi rakonto, ni restos solaj.

AGNESO BRUNO.



Foto de R. kaj J. Couper,

UNUA KONGRESO DE SKOTAJ ESPERANTISTOJ.

«Royal Studio», Glasgow.

La Kongreso en Genève instigis admirindan kaj sukcesan propagandon en Svisujo; oni povas esti certa ke la loko elektita por nia 3^a kongreso estos nova instigilo por niaj britaj amikoj jam en konstanta antaŭenirado.

Jen estas kelkaj dokumentoj ricevitaj senpere pri ilia estinta aktiveco, kiu ebligas havi la plej grandan kaj pravan konfidon en la estonto.

Unua Kongreso de Skotaj Esperantistoj.

Interesa konferenco okazis sabaton, 30 Junio, en la malnova urbo *Stirling*, glora en la historio de Skotlando kaj egale konata pro la beleco de la ĉirkaŭaĵo. Multaj Skotaj verdsteluloj, pleje membroj de la Societoj de *Glasgow* kaj *Edinburgh*, renkontiĝis kun kelke da *Stirling*anoj por viziti la vidindaĵojn, partopreni en iom da amika interparolado en la kara lingvo, kaj preparoli la baldaŭan fondon de Grupo Esperantista en *Stirling*. La kongresanoj kunvenis ĉe antaŭe-elektitan rendezvion apud la kastelo kaj poste eniris en la korton de la malnova fortikaĵo, kie lerta fotografisto ekzercis sian «Nigran Arton». La kastelo de *Stirling* staras sur granda ŝtonego, kaj de la remparoj, rigardante nordokcidenten, oni povas ĝui belegan vidaĵon sur la ebenaĵo, tra kiu rivero *Forth* fluas, kurbigante kiel arĝenta serpento, ĝis kie la malproksimaj *Grampian* montoj altiĝas al la ĉielo, iom da restanta neĝo en la fendegoj sur kelkaj grandaj pintoj ankoraŭ rebriligantaj la radiojn de la somera suno. Esplorinte ĝisdezire la kastelon kaj vizitinte aliajn interesaĵojn laŭ la kompetenta gvidado de S^o W. B. Cook, la ĉefredaktoro de la ĵurnalo: «*Stirling Sentinel*» kaj la pioniro de Esperanto en la ĉirkaŭaĵo, la verdsteluloj kunvenis en la *County Hotel*, kie paroladoj, kantoj kaj deklamoj efektive pruvis, ke Esperanto plene taŭgas en ĉiu rilato. Kelkaj lokaj kleruloj — Edukistoj, k. c., — ĉeestis kaj poste esprimis sian aprobon por la lingvo, afable promesante simpatian konsideradon kaj helpon.

Favorite de ideala vetero, la kongreso estis tute sukcesa kaj ĉiuj ĉeestantoj konsentis, ke tiaj kunvenoj multe utilas por nia afero, decidiinte unuvoĉe ke ĉiujara konferenco devos fariĝi regula parto de la programo de la Skotaj Esperantaj Societoj.

(Esp. 8820). (Skoto).

Alia pruvo de l' aktiveco de niaj skotaj samideanoj estas rimarkinda parolado farita en Edinburgo de nia amiko G. D. Buchanan.

Tre lerte kaj ĝuste li preparolis la gravan temon «La komerca alprenado de Esperanto».

Ni konsilas al tiuj, kiuj interesiĝas pri tiu grava demando — kaj ĉiuj ĝin devus, ĉar ĝi estas viviga demando por Esperanto — legi la paroladon en la n^o 20^a de l' bonega «The British Esperantist», kiu devus esti en la biblioteko de ĉiuj grupoj kaj propagandistoj, precipe la ĵus komencitan jaron.

(Plezure ni transdonos la mendojn akompanatajn de of. 40 c.) Fine S^o Wm M. Page petas nin inviti, de nun, la kongresantojn viziti sian belan landon. «Mi povas promesi al ili, li diras, grandan ricevon de miaj samlandanoj».

Estas okazo por rememorigi pri la gvidlibreto tute en Esperanto «Kondukanto al la belega Skotlando», kiun ni dezirus vidi aĉeti kaj diskonigi multe, pri la kaŭzo dirita de S^o Th. Rousseau pri «Tra Berna Oberlando» [1 penco, ĉe Geo Higgie & Co, Rothesay, Glasgow, Skotlando].

En Yorkshire (Anglujo).

S^{ro} F. L. G. Maréchal, per sia senĉesa agado, sukcesis fondi 4 sekciojn, ĉirkaŭ Leeds, dum la grupanaro en Leeds kreskis en unu jaro de 12 ĝis 150.

Ĉiusabate la 4 grupoj renkontiĝas ĉe la City Square de Leeds, kaj oni pliperfektigas en la uzado de Esperanto per promenadoj kaj paroladoj.

Tiuj, kiuj aŭdis nian flaman kaj flamigan samideanon F.L.G. Maréchal, en Genève, ne dubos eĉ unu minuton pri la sukceso de l' Leeds'anoj.

Cetero nia brita batalantaro enhavas multe da homoj aktivaj kaj sindonemaj simile kiel S^o Maréchal: ĝi estas armeo el *Marŝaloj* kondukata de simpla leŭtenanto-kolonelo! Sed nelacebla; kaj tiel kuntiranta, ke ĉiam li havas kunsila venkon.

Tial, prave, S^o Hoskison, alia fervorulo, ĝojas en letero pri baldaŭa parolado de leŭtenanto-kolonelo Pollen en Leeds.

Certe, la distinga prezidanto de «Brita Esperanto Asocio» iros en multajn lokojn disporti la bonan parolon: ĉiuj kondukantoj de niaj anaroj agu simile, por povi, post 9 monatoj, iri en Cambridge kun multegenombra sekvantaro.

Kelkaj nomoj de Skotaj Samideanoj:

Unua vico. — N^o 2^a (de maldekstre): W. B. Cook, ĉefredaktoro de «*Stirling Sentinel*»; bonega gazeto gajnita por nia afero; *Fraŭlino Maud S Yuile* (8425); J. W. D. Kirland (9926). Dua vico. — R. J. Mackaren (11,303); J. M. Warden (8686), prez. de l' G. E. Edinburga; G. D. Buchanan (8820), nia kunlaboranto. Tria vico. — W. M. Page (12,319), hon. sek. de l' G. E. de Edinburgo, aŭtoro de l' gaja kanto «mia Esperantistino»; J. C. Scott (9932).

Bibliografio.

Ĝus aperis la ĉarma volumo « Memorskriboj kaj Rakontoj » de Frédéric Mistral, el kiu per tute escepta permeso, ni povis citi, Esperante, eltranĉaĵon. Ni estus tute feliĉaj ke tiuj el niaj legantoj, kiuj legas kaj ŝatas la francan lingvon, aĉetu tiun malkaran libron. Krom la plezuro, kiun ili trovas en la legado de modela verko, pri kiu ĉiuj eminentaj literaturistoj faris la plej atentindajn laŭdojn, ili helpus la francajn samideanojn kontraŭbatali gravan atakon:

Grafo d'Haussonville, ano de l' Franca Akademio, skribis en la konata franca ĵurnalo « Le Figaro » (1^a de Oktobro 1906), viglan artikolon titolitan « Kontraŭ Esperanto ».

Li subtenas la tezon ke Esperanto malutilis la naciajn lingvojn kaj, nature, kiel Franca Akademiano, li priraktas precipe la demandon je la franca vidpunkto.

La artikolo, kompreneble, pro la fameco de l'aŭtoro, havis grandan resonadon kaj jam sufiĉe malutilis nian aferon.

Ŝajnas al mi ke bonega maniero ĝin kontraŭbatali estus montri, per mendoj senpere farataj al la eldonisto, ke Esperanto, malproksime malŝatigi la naciajn lingvojn, tute kontraŭe instigas aĉeti verkojn skribitajn en tiuj lingvoj, konigitajn per Esperanto.

Do ni instigas tiujn, kiuj ŝatas la francan lingvon rapide mendi « Les mémoires et récits, de Frédéric Mistral » ĉe *Les Annales Politiques et Littéraires*, 51, Rue St Georges, Paris, France: 3 fr. 50. Oni ne forgesu aldoni, france, ke tiu mendo estas instigita per legado de eltranĉaĵo de l' verko en revuo Esperanta.

Je pli ĝenerala vidpunkto, estus necese ke tiel oni ĉiam faru kiam iu ajn anonco en Esperanto instigas unu el ni legi libron aŭ ĵurnalon, aŭ aĉeti ian esperantaĵon.

Malmultaj estas jam la komercistoj interesantaj pri Esperanto. La plej bona maniero kreskigi ilian nombron estus montri al ili ke, kiam — tiel malofte! — ili faras anoncojn en Esperantaj revuoj, tiuj anoncoj ne estas perditaj, kiel ili estas emaj ĝin kredi.

Do, unue, la devo de veraj esperantistoj estus aĉeti plivole esperantaĵojn; due, ĉiam konigi, kiam ili faras sian mendon, kie ili vidis anoncon.

Ekzemple, se oni skribus al S^o Jadeau, kreinto de l' bonega ĉampanvino « Mirinda »: « Pro la anonco, kiun mi legis en « l'Espérantiste » mi mendas al vi unu korbon da boteloj de via vino » tiu sinjoro vidus, ke la sumeto pagita de li ne estis tute senfrukta, kaj li daŭrus anonci en la dirita revuo kaj eble en aliaj.

Kaj tiel, iom post iom, diskoniĝus la komercaĵoj je la marko Esperanto.

Ni reparolos pri tiu grava punkto, ĉefa por nia afero kiel ni jam skribis.

« Esperanto et Croix Rouge ». Tiu broŝuro pri aplikado de Esperanto al la servoj de l' Societoj de Ruĝa-Kruco ĝus aperis.

Ne nur tio verketo estos tre utila dum militiro ĉe la ambulancoj kaj milithospitaloj, sed ankaŭ la oficiroj, kuracistoj, farmaciistoj, anoj de Ruĝa-Kruco, kiuj deziras fari serion da paroladoj pri nia kara lingvo, en ĝi trovos multajn dokumentojn kaj eĉ siajn paroladojn tute verkitaĵn.

En unu el la paragrafoj, la aŭtoro Leŭtenanto Bayol, instruktoro ĉe la speciala militista lernejo de Saint-Cyr (Seine-et-Oise) Francujo, donas teknikajn esprimojn pri militistaĵoj, maristaĵoj, medicino, farmacio, k. t. p.

Foje pro la intereso kaj la praktika utileco de tiu grava verko, kaj ankaŭ pro la konateco de l' aŭtoro, kiu tiel fervore bataladas por nia afero, ni varme rekomendas la akiron de la broŝuro.

Ĝi estos bonega propagandilo en la manoj de l' grupestraroj, kiuj, per ĝi, povos penadi apud komitatoj de l' regionaj Ruĝaj-Krucaj Sekcioj. Ankaŭ ĝi estos tre oportuna, pro la interesaj militistaj sciigoj kaj la milita terminaro, por la propagando en la militaj mezoj.

(Ĉe Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris).

« Julio Cezaro », de D. H. Lambert B. A. (Oxon). La genia W. Shakespeare, al kiu ni devas la plej rimarkindan verkon de nia literaturo, Hamleto, tradukita de nia majstro mem, jam ofte inspiris niajn anglajn samideanojn. Julio Cesar daŭrigas inde la serion rimarkinde malfermitan de « La Ventego », de Achille Motteau.

Estas neeble resumi en la kelkaj linioj dediĉeblaj al tiu mallonga raporto, la dramon rakonton pri la mortigo de Julio Cesar, antaŭdirita de l' intrigoj de l' konspirantoj, celantaj varbi la amikojn de l' generalo; tiun de l' kolero de l' popolo kontraŭ Cezaro post la krimo, kiam, trompita de Bruto, ĝi kredas, ke Cezaro volis ĝin senigi je libereco, kaj ĝia elŝanĝo

post la rakonto de Marko Antonio montranta, kontraŭe, la amon de Cezaro al la popolo.

Ĉiuj aliaj partoj de l' dramo estas des pli interesaj kaj la legado de tiu bela verko, lerte tradukita, estos certe granda plezuro por niaj gelegantoj, kiel ĝi estis por ni mem (1 § 7 d. ĉe The British Esperanto Association, 13, Arundel Street Strand, London, W. C., England).

Dua eldono de « Esperanto, neutralni jazyk mezinárodní », de Th. Cejka kaj Jos. Krumpholtz. Ni povas nur diri ke la libro, certe bonega pro la fameco de l' aŭtoroj, estas tre plaĉe prezentita. Ankaŭ tiu verko tute taŭgas por sentigi al la legato la ĉarmon kaj valoron de Esperanto, per komparo de la lingvo ĉeka, tiom malsimila al la sia kaj tiel stranga kun ĝiaj specialaj literoj, kun la facila kreaĵo de D^{ro} Zamenhof.

La samaj aŭtoroj verkis ankaŭ bonegan lernolibron komencantan per sciigoj pri Esperanto. Poste venas la gramatiko kun tabeloj lerte prezentantaj la regulojn, afiksojn, k. t. p.; — la ekzercaro de D^{ro} Zamenhof tradukita ĉeken; — tekstoj en Esperanto por la komencantoj, inter kiuj kelkaj proverboj el la proverbaro de D^{ro} M. F. Zamenhof, pri kiu iam ni parolis, kaj fragmento de la antaŭparolo de D^{ro} Carlo Bourlet por « Majstro Jan Hus », de J. P. Khun.

Tiu lernolibro estas, tipografie, vera modelo por similaj verkoj.

S^o Th. Cejka, fine, eldonis elegantan broŝureton enhavantan la altsentan leteron de D^{ro} Zamenhof pri la deveno de Esperanto, lian paroladon dum la kongreso Bulonja, kaj tiun de S^o Kabe, kiu havis tiel grandan sukceson.

Pro la pureco de l' 3 tekstoj, el kiuj 2 estas de nia majstro mem, tiu libreto estas tute rekomendinda (0 fr. 35 sen afranko ĉe S^o Th. Cejka, Bystrice-Hostyn, Moravio, Aŭstrujo).

De S^o Ĉefeĉ « La langue Esperanto » kaj la rimedo ĝin lerni sen lecionoj, legante historieton. En tiu volumeto, S^o Ĉefeĉ ĝeneraligas la procedon uzitan de S^o Aŭg. Montrosier en la rimarkinda kurso, kiun li verkis en la grava franca revuo « Les Annales politiques et littéraires ».

S^o Ĉefeĉ tradukis angle la broŝuron sub la nomo « The Whole of Esperanto ». (ambaŭ 10 centimoj ĉe l' aŭtoro, 45 Christchurch Road, Streatham Hill, London, S. W.)

LEGADAMIKO.

« English-Esperanto supplement » de S^o P. D. Hugon; Tiu libreto estas aldono al la vortaro. Per sia klasigo, ĝi utilas ne nur al la Angloj sed ankaŭ al la alilandanoj. La vortoj estas dividitaj laŭ specialaj tabeloj. Pri la sciencaj vortoj, oni trovas samtempe la latinan kaj Esperantan nomon, kaj kiel diras la aŭtoro: se tiu verko estus farita pli frue, multaj Esperantistoj ne estus devigitaj peni por trovi ke: *anĉovo*, *engraŭlo* kaj *sardelo* havas la saman signifon.

Tiu libreto enhavas plie komercan, financan kaj leĝan parton. En tiu aldono, oni trovas la vortojn, kiuj ne estas enskribitaj en la Esp. — Fr. Vortaron. — Turni sin al la « Review of Reviews », Londono.

D. M. P. G.

Bonega kvarkolona artikolo en la islanda gazeto « Templar », kiu montras ke nia kunlaboranto T. T. ĉiam laboras por nia afero.

Muziko.

Ĝus aperis:

« Mia Esperantistino », vortoj de W. M. Page, el Edinburgh, muziko de J. A. Moonie. (Ĉe Edinburgh Esperanto Society).

« Esperantaj Kantoj », vortoj el krestomatia: N^o 1, kuŝas Somero, N^o 2, Nova Kanto; muziko de Arthur Trickett. (Ĉiu 3 pencej, ĉe B. E. A. 13, Arundel Street, Strand, Londono.

« Krisnasko », poezio de Théophile Gautier, esp. de D^o Philippet, muziko de Louis Rigoir, (ĉe l' aŭtoro, 20, Rue des Ormes, Charenton (Seine).

Naskiĝintaj Revuoj.

« Amerika Esperantisto » (5 frankojn, Oklahoma City, U. S. A.), monata propaganda revuo por Amerikanoj, en la angla lingvo; tre beleta eldono.

« La Japana Esperantisto », ilustrata propaganda revuo por Japanoj, *japanskribe* eldonata, kun kelkaj partoj en Esperanto (60 senoj, No 1^a, 3^ecome, Jurakĉo, Kozimacik, Tokio).

« Foto-Revuo », monata tute Esperante. (5 frankojn, 118 R. d'Assas, Paris), redaktata sub direktado de S^o Charles Vérax, tute kompetenta pri la fotografa fako.

Niaj novaj kolegoj havu la sukceson dezirindan por ĉiu nova entrepreno por Esperanto, kiu vere plenumas mankon aŭ havas celon precize difinitan.

LEGADAMIKO.



EN LA CEDRARBARO DE TENIET-EL-HÂD.

La Cedrarbaro de Teniet-el-Hâd.

Originalo de M. MENDE, (Algerio).

Kiam oni lasas la fervojon irantan de Alĝero al Oran, ĉe la haltejo de Affrevilo, veturilo estas tie por ekveturigi vin, je la tagmezo, direkte al la Sudo.

Tiu ĉi antikvaforma veturilo nomata vulgare « diligence », kiu iam estis la lasta pensado de l' progreso, estas ankoraŭ nuntempe la sola rimedo por vojaĝi en la sudlando de Alĝerio inter la zonoj de Eŭropanaj loĝejaroj.

En dezertazonoj, oni ĉiam uzas nur rajdbeston nomitan « dezertsipon », la kame'on, kies movo sur la vastega sablomaro sentigas al la rajdanto sentaĵojn de la movantaj oceanondoj.

Sed, en la regiono, kie ni estas nun turiste, ni devos amasiĝi en tiun ĉi vojaĝan keston mallarĝan kaj malkonfortan de niaj prapatroj; se tamen oni ne posedas mem tiun vivegan movilveturilon, kiu ensorbas la interspacon kaj ŝparas la tempon.

Ja ni do ekiros en la « diligence » sed ne iros diligente, ĉar ni uzos sep horojn por transiri la sesdek kilometrojn inter Affrevile kaj Teniel el Hâd.

Tamen kiam la vetero estas bela la tempo ne estas perdita, precipe se oni estas lokita sur la imperialo; ĉar la pejzaĝoj estas pentrindaj kaj admirindaj.

Unue oni trapasas larĝan kaj platan valegon; la mezon de tiu ebenaĵo trairas la Ĉelifrivero kiel ondolinia rubando. Poste oni eniras inter montetlandojn, kie estas dissemitaj multaj arbetoj senkulturaj. Tie, oni vidas kelkafoje proksime kaj malproksime farmdomon kun, ĉirkaŭ ĝi, iom da plugeblatero.

Poste oni alvenas inter montojn kovritajn je kelkaj arbaroj, kaj, la vidiĝo iĝas pli kaj pli arbara kaj kruta. Oni vidas nun multajn promontorojn, kiuj enpremas inter ili profundajn valetojn, krutajn ŝtonegojn kaj nesuprenireblajn pintojn.

La vojo malvolviĝas flanke de la deklivoj, jen dekstre, jen maldekstre, laŭ la multaj zigzagoj de torentoj, tra lando, kiun nur la kaproj povas trairi. En tiu ĉi amasego da montoj kaj valoj multe da ĉiuj specaj arboj, arbetoj kaj arbetaroj malvolviĝas, kaj kovras tute la deklivojn. Kverkoj, vivarboj, pinoj, juniperoj kaj olivujoj per diversaj grupoj aliĝas al pejzaĝojn kaj diversiĝas la panoramojn. Kelkafoje oni vidas la postsignojn de freŝaj bruladoj. L'arbaro montras tie trunkojn nigritajn kaj sekigitajn de la fajro. Cetere ĉiuj arbaroj, kiujn ni trapasas, estas junaj, ĉar la bruladoj neniam ebligas ke la arboj

maljuniĝu; tio ĉiam okazas: tiun ĉi jaron, tie ĉi; alian jaron, ĉe alia parto.

Fine oni alveturas ĉe Teniet-el-Hâd je la sepa horo vespere. Necese ni devos atendi la morgaŭan tagon por viziti la cedrarbaron.

Ni trairis ĝis tie ĉi arbaran regionon, kaj nun ni troviĝas sur plataĵo senarbara; la teraro ĉirkaŭanta estas senigita je arboj, por aliformigi la teron kaj naski paŝtejarojn. La plataĵo sur kiu estas konstruita la urbeto Teniet-el-Hâd, dividas la du flankojn de la montaro disigante « le Tell » de la regiono dirita « les Hauts-Plateaux » (altaj plataĵoj). Je la unua parto, la akvo iranta al la Nordo en la Maron surverŝas landojn riĉajn, kulturajn kaj fruktodonajn; je alia parto, l'akvo direktiĝas tra la altaj plataĵoj de « Sersu » kaj de « Ĉelala ». Tiuj teroj estas vastegaj ebenaĵoj dezertegaj; tie kelkaj grenkampoj malvolviĝas inter tiuj vastaj spacoj, kie kreskas malgrasaj paŝtejoj; regiono nomita « Saflando ».

Tie estas supre la altaj flankoj de la montaro direktiĝanta de Oriento al Okcidento, kaj montriĝas arbarazono tre rimarkinda. Tie oni vidas tiun belegan kaj vizitindan cedrarbaron. La zono arbara komencas je mil kvin cent metroj de la urbo; sed la arboj, kiujn oni vidas unue, ne estas cedroj sed kverkoj. La cedroj staras nur sur altaĵo je mil tricent metroj super la maro.

Nordflanke de la monto vojo, kie veturiloj povas pasi, trairas la tutan arbaron, turniĝante laŭ la multaj valetoj, trapasante tiujn grandajn arbarojn ĉiam verdajn.

Oni pasas jen sub misteraj ombraĵoj de maljunaj cedroj, kies branĉoj tiom strange kurbigas kaj tordiĝas, jen tra la junaj cedroj, kiuj direktas al la ĉielo la sagojn de siaj rektaj trunkoj.

Tia estas rimarko, kiun faros unue la turisto mirigita. Li kredos vidi ĉirkaŭ si, du specojn arbajn: la juna kaj la maljuna cedro. La maljuna cedro estas rimarkinda pro sia karakteriza formo, la kapon malvolviĝantan kiel ombrelo, la trunkon elmetantan ĉirkaŭ si, horizontale, grandajn branĉojn ŝajne plektitaj, kies foliaroj intermiksitaj ŝirmas multajn pinfruktojn. La frukto de cedro similas efektive al la pinfruktoj. En aŭtuno ĝi lasas ekforiri kaj dissemiĝi siajn multajn papiliojn kiuj forportas la semon, sed de ĝi malrapidiĝas la falon.

La grajneto delikata kaj pinta enmetiĝas inter la kavajetojn de la ŝtonaroj; tie atendas ĝin iom da tero, kiu al ĝi donos la vivon. Sed, tiu ĉi semo prosperas nur sur supramaralteco je mil tri cent metroj; ĉiuj grajnoj subirantaj en la valon estas perditaj.

(Daŭranta).

Originale verkita kaj ilustrita de
M. MENDES.



La nova membro de l' Parlamento

Elliraĵo el parolado raportita en provinca ĵurnalo.

Mi volas paroli pri mia unua monato en la « House of Commons. » Mi havas tie novan sperton de vivo, kiu tre similas al la eniro de nova knabo en lernejon, kie jam estas multe da pli maljunaj knaboj, kiuj faras kion ajn ili volas. La ĵusveninto devas ĉirkaŭrigardi por sciigi kiel konduki, kien sidiĝi, kiam paroli kaj kiam silenti, kien estas permesite iri, kion oni konsideras kiel nedeca. En la unua tago estis strange vidi, ke iu ajn povas enmarŝi, diri ke ĝi estas membro, kaj preni sidejon por si mem. Sed estus ja tre danĝere por ne elektita viro fari tian provon duan fojon. Eble oni arestus la tiel kuraĝinton, kaj kulpigus lin pro malrespekto al Parlamento, kaj malliberigus lin en la Turon de la Horloĝo.

Ŝajnas al mi, ke ĉiu membro estas ĉiam tentata malŝpari sian tempon.

La ordinaraĵoj de la « House » (ĉambro de nenobelaj) daŭras de la tria ĝis la noktomezo. Eble nur dudek aŭ dudekkvin membroj partoprenas en la diskutado: eble nur cent havas intereson pri la diskutotaj temoj. Sed la sescent sepdek membroj ĉiuj sentas sin ĉiam altirataj al la palaco per allogeco kvazaŭ magia. La tieaj manĝoĉambroj, fumoĉambroj, skribsalonoj; la biblioteko, la balkono, la babilado; la kunesto kun kleraj kaj famaj viroj, — ĉio fariĝas tento al maldiligenteco. Oni povas pasigi tie la tutan tagon tre plezure, sed (oni devas konfesi) senlabore kaj preskaŭ senfrukte.

Alia rimarkinda afero estas la leteroj, kiujn ricevas membro de Parlamento. Ili ne nur estas leteroj amikaj kaj gratulaj, sed ankaŭ komunikaj de (ŝajne) preskaŭ ĉiuj komercistoj kaj butikistoj en Londono, kiuj lin petas veni kaj ekzamini ion, aŭ proponas liveri al li milon da objektoj, kiujn li tute ne bezonas. Hieraŭ mi estis tiel sciama, ke mi kalkulis kiom da leteroj mi estis skribinta post mia eniro en Parlamenton; kaj mi estis mirigata trovi, ke ili atingis la ciferon cent ĉiusemajne. Tiu cifero korespondas al la ricevitaj leteroj, kiuj postulas respondon. Sed almenaŭ egala nombro da ricevitaj leteroj restas senrespondaj. Oni do povas kompreni, ke la simpla malfermado kaj legado de leteroj okupas senteblan spacon da tempo, kaj ke la ĉiutaga skribado estas longa kaj kelkfoje enuiga afero.

Esp. de J. C. RUST.

(Soham, Anglujo).

La superverŝado kaj la Administracio.

De ALFRED CAPUS, ano de l' FRANCA AKADEMIO.

Altranga oficisto — (Direkcio de la laboroj de la urbo). Kioma estas la hodiaŭa dato?... Ha! la deka de junio.... Bone!... (al la pedelo), ĉu vi volas sciigi al la subdirektoro, ke li venu en mian kabineton.

La Pedelo. — Ĵus alvenas sinjoro subdirektoro.

La altranga oficisto. — Enirigu lin... (Eniras la subdirektoro) Bonan tagon, kara sinjoro, bonan tagon.... Certe vi rimarkis ke hodiaŭ estas la deka de junio?

La subdirektoro. — Ja.

La altranga oficisto. — Ĉiujare, de tiu ĉi tago, oni duobligas la nombron de la superverŝistoj de la ĉefurbo; do, mia kara subdirektoro, vi tuj plenumos la necesajn formalajojn por, ke oni superverŝu Parizon kaj la Bulonj' arbaron sufiĉege.

La subdirektoro. — Ĉio estas preta, mia kara majstro, sed mi ne kredas, ke estas utile komenci hodiaŭ.

La altranga oficisto. — (faldante la brovojn). Kial tio?

La subdirektoro. — Pluvegas.

La altranga oficisto. — Ĉu vi pensas ke mi ne tion vidis?

La subdirektoro. — Ĉe tiu okazo, eble la superverŝado estus....?

La altranga oficisto. — Senkulpigu min, kiel povas rilati la pluvo al la superverŝado de la ĉefurbo?

La subdirektoro (ridetante). — Dam!

La altranga oficisto. — Ni vagas, mia amiko, la pluvo estas meteorologia fenomeno, la superverŝado estas administracia fenomeno; tiuj du fenomenoj neniel rilatas unu al la alia... Vi ŝajnas kredi ke oni superverŝadas la stratojn por surterigi la polvon, kaj malsekigi la pavimojn; se tio estus, ja estus senutile superverŝadi kiam pluvus; sed oni ne superverŝadas por tio: oni superverŝadas tial, ke ĝi estas la monato junio, kaj tial, ke oni devas okupi la superverŝistojn kaj la tubojn por superverŝi. Pluvadus dum kvardek tagoj senintermanke, oni superverŝadus malgraŭ tio, ĉe la regularaj horoj. Ĝi ne estas la pluvo, kiu iam malebligos, ke la administracio plenumu sian devon kaj atentu pri la regularo.

Esp. de D^{ro} M. P. G.

(Loudun, Francujo).



Tra la Sportoj kaj Turismo.

Julio-Septembro 1906.

Multobligas ĉie la grandaj sportaj kunvenoj. Ŝajnis al ni, ke nia gazeto ne devis indiferentiĝi pri tiuj okazantaĵoj karakterizaj, kaj de hodiaŭ, ni regule ilin pritraktos. Ĉiujn sciigojn pri internaciaj sportaĵoj oni bonvolu sendi al nia administracio.

Ĉar la du lastaj monatoj estis treege plenigitaj je sportaj kunvenoj, ni povas paroli nur pri la ĉefaj el ili. Tia alfluo elmontras bone la gravecon akiritan de tiu speco de okazaĵoj en la nuna vivo.

La Rondkurado tra Francujo.

(5^{an}-29^{an} de Julio).

La fama ciklista ĉiujara kurado organizita de nia sporta kunfrato « L'AUTO » konsistis el dektri kuraderoj tra Paris, Lille, Nancy, Dijon, Grenoble, Nice, Marseille, Toulouse, Bayonne, Bordeaux, Nantes, Brest, Caen kaj ree fine Paris, en tute 4600 km. Niaj plej agemaj vojiristoj (kuristoj sur vojo) veturadis tra la ebenajoj de « Nordo » ĝis « Sudo » sub varmega suno, en polvo kaj ofte kun kontraŭa vento kaj ankaŭ sur la krutaj deklivoj de Alpoj. Sepdek sep ekiris kaj nur dek kvar kuraguloj venkis la lacecon kaj insidulojn de l' vojo, per sia volo. La venkinto estis *Pollier*, unu el niaj plej simpatiaj kuristoj, skvata de *Passerieu* kaj *Trousselier*. La kvara *Petit Breton* estas la unua el la kategorio de ciklistoj farintaj la tutan kuracon sur la sama maŝino markita per sigelo. Ĉiuj kvar sur bicikloj *FREGEOT FRÈRES*. Meza rapideco de la unua, 26 km. en horo.

La Pokalo de l' Ĵurnalo

« Le Matin ».

(2^{an}-28^{an} de Aŭgusto).

Konkurso por turismaj aŭtomobiloj. 5000 km. tra Francujo. 50 konkurantoj ekirantaj, 27 alvenantaj, kies 15 tute senkulpaĵ pri reguleco. Ĉiu veturilo devis atingi mezan rapidecon laŭ sia kategorio de motora forto. Grandega sukceso! Generale, triumfo de la malpezaj veturiloj francaj de la bonega firma fama de *DION-BOUTON*.

La Cirkaŭo de Ardenoj Belgaj.

(13^{an} de Aŭgusto).

Trairata sep fojojn sur ĉirkaŭo senfina de 85 km. (600 km. tute), Venko de *Duray* (aŭt. franca LORRAINE-DIETRICH) en 5 h. 38 m. 39 s. Meza rapideco 107 km. en horo. — Dua *Hanriot* (DARRACQ) nur je du minutoj post la unua. — Tria *Rougier* (LORRAINE-DIETRICH). La kvin unuaj sur pneumatikoj *MICHELIN*. Kurado tre interesa kaj necerta ĝis la lasta minuto.

La Cirkaŭo de Ardenoj Belgaj por Motorcikloj.

(9^{an} de Septembro).

Tiuj malgrandaj maŝinoj « aŭtomobiloj de l' malriĉulo » kuradis sur 225 km. Rimarkinda estis la sukceso de la franca firma

La Festo de l' « Cent Mila » ĉe la Turing Klubo de Francujo.

Unu el la plej gravaj okazintaĵoj de l' lastaj sportaj kaj turistaj monatoj estis la admirinda festo per kiu la « Turing Klubo de Francujo » solenis sian CENT MILAN! anon.

Ĝi okazis en la Palaco de Versailles (Versaj): multaj eminentuloj, inter kiuj S^o E. Loubet, eks Prezidanto de la Respubliko, kaj S^o Barthou, ministro de l' Publikaĵ Laboroj, paroladis kaj laŭdis la rimarkindajn rezultatojn akiritajn de tiu potenco kaj bonfara asocio.

Aparte, pri la hotela rilato, la multaj turistoj kiuj ĉeestis la grandajn sportaĵojn ĉi supre priparolitajn povis ilin ŝati! Ĉiujare la vojaĝanto konstata pli boniĝon ĉe la hoteloj.

Ĉiuj vojaĝantoj konsentis en ĉiu tempo kaj konsentis pri la supereco de la franca kuirarto rilate la diversnaciajn; sed, iam, la hoteloj ne ĉiam havis la komforton kaj purecon dezirindajn.

GRIFFAN, kies tri kuristoj estis la tri unuaj, nome *Giuseppe*, *Cissac* kaj *Demester*. Meza rapideco 76 k. 800. Daŭro de l' kurado de la unua 2 h. 55 m. 45 s. — Bonega kurado de la firma belga *SAROLEA* el Liège en ĝia kategorio. La Belgoj estas maŝinistoj en la konstruado de l' turismaj motorcikloj.

La kunveno de Monto Ventoux

(15^{an} de Septembro).

La unua dekliva kurado de l' jaro sur la plej fama kruta suprendeklivo de Francujo, ĉe Provencaj Alpoj. 22 km. po 8 ĝis 13 %, en maloportuna teraĵo kun kurbiĝoj malfacilegaj. Oni povas nomi tiun tagon « tago de la aŭtomobiloj *ROCHET-SCHNEIDER* » ĉar *Collomb* sur veturilo de tiu firma supreniris nur en 24 m. 40 s. — En motorcikletaj kategorioj oni rimarkas la firmojn *ALCYON* kaj *GRIFFON*. — Unuaj: *Champoiseau* (*ALCYON*) en kura kategorio en 26 m. 34 s. kaj *Giuseppe* (*GRIFFON*) en turisma kategorio en 26 m. 58 s. — En tiu ĉi lasta kategorio ĉiindega estas la malgranda malpeza motorciklo *MAGNAT* kaj *DEBON* el Grenoble, gvidata de *Escoffier* kiu, kun motoro nur 2 1/2 m. ĉ. kuris kaj venkis maŝinojn kunkurantajn kun motoroj 8-10 m. ĉ. kaj supreniris la deklivon en 35 m. 46 s. Tio estas eksterordinarega kaj elmontras tuthonegan kaj zorgplenan fabrikadon.



GRIFFONE.
Venkinto de la Kategorio motorcikloj ĉe Monto-Ventoux kaj de la Ĉirkaŭo motorcikleta de Ardenoj.

Diversaj okazaĵoj

Ni citu ankoraŭ la jenajn sportajn okazintaĵojn: Priedkuradoj ĉirkaŭ Paris de niaj kunfratoj *L'AUTO* (piedkuro) gajnita de *Siret* kaj tiun organizitan de nia boninformata kunfrato « *LE JOURNAL* » (tre fervora por Esperantismo) kaj de ĝia aldono sporta « *LES SPORTS* » (Marŝo). Tiu lasta gajnita de *Fantou*.

Ambaŭ treege sukcesis meze gravan popolamason kaj donis al la Paris'anoj senegalajn spektaklon.

LA POKALO DE AUVERGNE por turismaj aŭtomobiloj gajnita de *Rigoly* sur *GOBRON*.

LA POKALO DE LIEDEKERKE (Belujo) gajnita de *Wilhelm* sur turisma veturilo *MÉTALLURGIQUE*.

Fine la POKALO GORDON BENNETT AEROSTATA (30^{an} de Septembro). — 16 aerostatoj gvidataj de aerveturantoj riprezentantaj sep naciojn, eliris Paris'on por gajni la artaĵon proponitan de S^o J. Gordon Bennett al kiu el la kunkurantoj malsupreniros teren plej malproksime de sia loko de eksuprenio. Sep kuraguloj sukcesis transiri « *Manikon* » (Kanalon Anglan) kaj alvenis en Anglujon. La venkanto, S^o *Frank P. Lahm*, malsupreniris en Scarborough'on (Anglujo) je 640 km. for Paris. La Pokalo apartenas nun al Ameriko, kies unu el la reprezentantoj li estis.

Speciale por « Tra la Mondo »
de L. DE GUESNET.

A. MONTROSIER.



VILAĜANA MOVADO EN GURUJO.

Gurujo — unu el la malgrandaj anguletoj de la belega Georgie — enhavas proksimume 100,000 loĝantojn kaj formas unu el la plej kulturaj distriktoj ne nur en Kutaisa gubernio, sed ankaŭ en tuta Ruslando. Ĉia vilaĝo havas sian propran lernejon kaj legejon (bibliotekon), ĉia societo — sian duklasan lernejon. Laŭ statistiko farita de propagandistoj de Ruslanda Social-Demokratia Laborista Partio, en Gurujo oni kalkulas 97 % da homoj sciantaj legi k. skribi; gejunularo libere legas k. skribas ruse. Vojoj de komuniko estas belegaj, vilaĝanaj loĝejoj mirigas per sia pureco k. ordo, kampojn oni artemaniere malsekigas, k. racia terkulturo estas plej perfektigita.

Gurujo estas avangardo de vilaĝana (1) movado Ruslanda, batalanta por siaj politikaj rajtoj; rusa vilaĝano povas multe lerni de sia kaŭkaza kolego-Guro. De ili lernis kaŭkazaj vilaĝanoj; Gurujo estis ekzemplo de vilaĝana movado, ĝi estis unua bacilo infektinta alian vilaĝanaron de Transkaŭkazo.

Guro estas same belega, kiel estas belega la naturo ĉirkaŭanta Gurujon. Altaj Adjaro-Gurujaj montoj, fiere k. maltime ĵetitaj laŭlonge de orienta k. sudorienta landlimo, kvazaŭ antaŭe donas ideon pri karaktero de tiu nacio, kiu loĝas apud fundamento de tiuj ĉi montoj, en belega k. riĉa valo. De okcidento ĝin limigas Nigra Maro, laŭlonge bordo de kiu estas reloj de fervojo kuniganta Gurujon kun Batum k. Tiflis.

Unuarigarde homon mirigas sufiĉego k. diverso de naturaj bonaĵoj; k. de unua rigardo, logiko indignas ĉe vido de tiu nekonformo inter natura riĉeco de lando k. de tiu neegalmezura dismeto de tiuj ĉi donacoj inter homoj, kiu karakterizas nian epokon.

Nemirinde, ke Guraja vilaĝano jam de longe estas fama kiel « sovaĝulo neestimanta fremdan proprajn ». Sed ne sole tiu ĉi trajto karakterizas Gurojn; ili, de nememoreblaj tempoj, estas konataj kiel ribelantoj, k. kiel la plej maltrankvila popolo inter Georgiens.

Gurujo ĉiam unua levadis standardon de ribelo kontraŭ almlilitoj; ĝi staris en unuaj vicoj dum batalo por libereco k. sendependeco. Ĝi estis anek-

sita (2) al Ruslanda imperio plej laste, kaj unua en 1840 levis ribelon kontraŭ dukapa aglo, ĉar ĝiaj loĝantoj estis impostitaj po 25 kopekoj. Kompreneble, ribelo estis subpremita per peza mano de aŭtokrato, sed kaŝita kolero por ofendo ĉiam vivis en iliaj koroj k. de tempo al tempo montriĝis eksteren. Eminentaj Gurujaj rabistoj — tio estas ĉefmaniere batalantoj kontraŭ arbitro de aŭtokratia regnestraro, aperadis kiel popolaj defendantoj. Tial ĉiuj popolaj kantoj gloras heroecon de rabistoj, tial popolo ĉiam staris sur ilia flanko, tial polico ne sukcesis batali kontraŭ ili. Historio de rabistoj metafore k. ame priskribita en verkoj de popola poezio, estas historio de regnestrara arbitro k. skandalo; en tiuj ĉi kantoj, ĉiam oni pravigas rabistojn k. kulpigas regnestraron. De tiu ĉi rezultas klare, kian riĉan fundamenton havis sub si revolucia bacilo ĉirkaŭpreninta kaŭkazan proletariaron. Ĝi, tiu ĉi bacilo, el urboj precipe kaj pli frue ol ĉie aperis en Gurujo. Manko de tero tie atingas lastan gradon, sed, veron dirante, tero estas entute malmulta k. bienhavantoj, grandaj terposedantoj tie preskaŭ ne estas. Vilaĝanoj estas devigataj serĉi laboron en urboj. Preskaŭ ĉiuj urboj de Kaŭkazo k. bordo de Nigra Maro ĝis Odessa niem estas plenaj je laboristoj — guroj. Laborista movado ĉirkaŭiginta Kaŭkazon trovis de flanko de regnestraro plej larĝan kunhelpon; ĝi dissendadis domen ĉiujn nomatajn gvidistojn, kaj Gurujo ricevis plej grandan nombron da organizitaj laboristoj. Ili precipe estis unuaj propagandistoj k. dank'al ili, de komenco mem, tiu ĉi movado havas karakteron regule organizitan.

Batalado komencis kontraŭ terposedantoj, nobeloj k. pastraro. Tiuj ĉi kiel ankaŭ multaj aliaj, en Gurujo neniam ĝuis popularecon k. influon; sed lastatempe antaŭ malkaŝa elpaŝo kontraŭ ili, ili fine perdis ĉian prestiĝon. Batalado aperis en formo de striko k. bojkoto — oni postulis plimalgrandigon de farma pago, k. rifuzis pagi al pastraro kian ajn monon.

(Daŭronta).

D^{ro} M. K.

(1) Antaŭmarsanto. — (2) Aneksi = Aldoni al teritorio.



La Korseto, de Doktoro DUMAS.

Jen sufiĉe pri la historio de tiu tirano; mi parolu iom pri ĝiaj suferantinoj. Ili estas multegaj, precipe inter la knabinoj kaj la virinoj ankoraŭ junaj aŭ kiuj deziras ŝajni tiaj.

La malsupra parto de la brusto kaj la supra parto de l' ventro, la talio pleje suferas pro la korseto, precipe ĉe la virino iom dika. Tie kuŝas, sur la unua vico, la malsupro de l' pulmo kaj la pinto de l' koro, poste malsupre kaj de dekstre maldektrajn la hepato, la stomako kaj la lineo; ĉiuj esencaj organoj el molaj, delikataj fibroj, kiuj neniam devas suferi « la malplej fortan premon. » Kaj, la ripoj kiuj kovras ilin estas nur « falsaj ripoj », ripoj movemaj, kiuj antaŭe ne havas apogpunkton, kiel la superaj ripoj, kaj kiuj, sekve, cedas sub la premo de l' korseto kaj kunpremas, premeblas la organojn, kiujn ili devas protekti. Jam Ambroise Paré, laŭ la diro de Montaigne, « vidis sur dissekciotablo kelkajn el tiuj beletaj personoj maldiktaliaj... iliaj ripoj rajdas unuj sur la aliaj. »

Ĉu oni povas imagi staton pli malutilan al la libera funkciado de tiel gravaj organoj? Ĉu la plej sperta turmentisto povus eltrovi ion pli malbonfarantan? Ha! se ni neniam vidinte korseton eksciis, ke tia popolo en la centro de Afriko aŭ de alia lando submetas la virinojn al tia turmento, kiel tuje ni forirus kvazaŭ en milito por liberigi la malfeliĉajn kreitaĵojn, kaj uzi la okazon por starigi protektoraton! Sed kion mi diras? Fiel multe ni faris ridindaj, ni superŝatis per epigramoj tiujn flinojn sufiĉe barbarajn por permesi ke iliaj edzinoj kunpremu, premegu siajn piedojn por plimalgrandigi ilin: kion ili kredeble pensas pri ni, kiuj lasas kunpreni, premegi organojn multe pli gravajn ol la piedoj?

Sub la senĉesa premo de l' korseto, la pulmo, malbone surverŝata de l' sango, malgrandiĝas, atrofiĝas, malfortiĝas, malbone plenumas siajn funkciojn, kaj fariĝas facila kaptajo por ĉiuj mikroboj de la malsano, kaj aparte por la mikrobo de la ftizo: « Kiom da junulinoj mi vidis mortii! »

La koro, samtempe sublevata kaj kunpremata, pligrandigas la normalan kurbecon de l' dikaj sangkondukiloj elirantaj el ĝi, kaj tiamaniere alportas al la rebonigo de l' sango en la pulmo seriozan malthelpaĵon. Tial, la sinjorinoj kiuj sin prenas en la korseto estas tute spiregantaj post la plej malgranda peno.

La hepato, tiu pordisto de l' organismo, repuŝata, premata de la falsaj ripoj, rigidiĝas, malbone plenumas siajn funkciojn kaj lasas eniri en la organismon malutilajn agantojn, kiujn ĝi nepre haltigus ĉe la enirejo se oni lasus al ĝi la liberecon de ĝiaj movoj.

La stomako kunpremata povas ricevi nur nesufiĉan nutraĵon, kiun ĝi sendas al la intesto neplene digestita. El tio, perturbacioj, malsanetoj, kaj baldaŭ la dispepsio, la gastrito, kies fino estas ofte fatala.

La lieno, tiu tenejo de l' organismo en kie ŝajnas amasiĝi la

sango momente disponebla, la lieno, sub la premo de l' falsaj ripoj, ne povas plilarĝiĝi por ricevi la sangon. Okazas forfluo kaj gravaj perturbacioj en la sangkondukiloj estas ĝia neevitebla konsekvenco.

Sed estas io plie: la hepato, la stomako kaj la lieno glitas sub la suferata premo, kaj puŝas, supren kaj malsupren, la apudajn organojn, kies funkcioj estas de tiam komprometitaj.

Jen estas, sen ia troigo, la tabelo de l' malbonfaroj de la korseto. Oni povas certigi, ke ĝi estas la kaŭzo de l' triono, almenaŭ, de la malsanoj, kiuj kaptas la vlrinon.

Antaŭ tiom da malbonoj, ĉu oni devas kruciĝi la brakojn, lasi fari, lasi kunpreni? La Amerikaninoj tion ne kredis: ili fondis « Ligon por la abolicio de l' korseto. » Plenan sukceson al ili mi deziras, sed sincere mi ne fidus al ĝi; ankoraŭ longe, eble ĉiam, la korseto majstre regos. Ni submetiĝu, ĉar estas devige; sed se ni ne povas ĝin venki, almenaŭ ni celadu plifleksebligi ĝin.

Mi ĝin dezirus elteksaĵo necedebla sed fleksebla, ridigita ĉe la malantaŭaĵo de du balenostoj, kiuj estus apogpunkto por la vertebra kolono. Ĝi apogus sur la supro de l' ventro, havus fendetojn por la libereco de l' flankoj, kaj supre, ĝi ĝustalfariĝus al la mamoj.

Sed; eĉ en tiuj kondiĉoj, nur de tempo al tempo oni devus permesi ĝian uzon al la knabino 15-16 jara, kaj antaŭ tiu aĝo ĝin anstataŭigi per larĝa tola ligilo tre ĝustalfarita al la korpo, sed malmulte ĝin prenanta.

Elfarite kiel mi ĵus diris, la korseto neniam malutilus kaj povus, iafoje, utili. D^{ro} Barić, tre kompetenta pri la malsanoj de l' koro, antaŭ nelonge publikigis bonegan verkon pri la « kardioptozo »: translokigo, mallevego de la koro. La eminenta kuracisto konstatis, ke tiu ĉi prolapsuso okazas pli ofte al la viro ol al la virino. Mi inkliniĝas kredi, ke al la surmetado de l' korseto, tiu ĉi ŝulduis tiun rilatan ekzemplojn.


Sed kial insisti? Tre malmultaj estas la virinoj, kiuj petas de la korseto ne malutilecon, sed utilecon; alian aferon la plimulto atendas de ĝi: unuj volas, ke ĝi kunpremu, plimaldikigu, kaŝu, ke ĝi estu tiu ĉi maloftaĵo, enhavanto pli malgranda ol la enhavato; la aliaj volas la tutan kontraŭon: ili bezonas korseton, kiun plidikigas ilin, por tiel diri naskas la dolĉan iluzion ke, ĉe iaj lokoj, io sublevas ĝin. Vi konfesos, ke tio estas multe peti de sama tualetilo.

Kun permeso de l'aŭtoro.

Esper. ROKSANO.

(Fino)





Kl. el « Les Annales ».

PRESENTADO DE LA « VESTA'ULINO » EN LA ARENOJ DE BÉZIERS.

Teatra Kroniko.

La Vesta'ulino.

La sukceso de la Vesta'ulino estis kolosa. Bruegan ovacion ricevis la eminentaj geaktoroj, kiuj majstre ŝatigis la potencan kaj doloran ĉarmon de tiu ĉefverko de l' drameca muziko. Tial S^{ro} Dujardin Beaumetz, subsekretario de ŝtato ĉe la Belaj Artoj, kiu prezidis niajn festojn, estis tiagrade entuziasmigata, ke li iris en iliajn loĝojn por ilin gratuli. Kiam li eniris la loĝion de la 60 baletistinoj, tiuj ĉi gaje saltis al lia kolo, kaj dum pli ol kvin minutoj la bela blanka kapo malaperis sub la oro kaj la ebono de la hararoj kaj sub punktoj, gazoj, silkoj multkoloraj.

Laŭ la opinio de l' ministro, por tia teatraĵo kiel la Vesta'ulino estas nur unu teatro, la Arenoj, nur unu urbo, Béziers'o, nur unu Meceno, S^{ro} de Beauxhostes. Kiam li faris tiun ĉi lastan kavaliron en la Honora Legio, oni estis surdigata per senfina aplaŭdo.

Ĉeestis tiuj prezentadoj S^{ro} Rabaud, la juna kaj brila aŭtoro de la « Filino de Rolland », kaj kies neclonita triakta dramo « La Unua Glavo » estas ludota la venontan jaron; S^{ro} Gaillard, filo de l' direktoro de l' Opéra, kiu jam preparas verkon por la prezentadoj en 1909; S^{ri}no Longworth, filino de l' prezidanto de la Respubliko en la U. S., kaj ŝia edzo, ke., ke.

JOHANINO FLOURENS,

La violono de Mozart.

Salzburg'o multege interesigas je la freŝa eltrovo de la vera violono, per kiu Mozart' ludis en siaj koncertoj. Oni ĉiam kredis, ke tiu violono estis vendinta en Anglujo; sed ĝi estas retrovita ĉe lernejestreto de Schoerfling'o. Oni havas nenan dubon pri l' aŭtentikeco de la violono, ĉar leteroj kaj dokumentoj pruvas, ke la fratino de Mozart vendis tiun faman muzikilon al oficisto, kiu revendis ĝin al la patro de l' nuna posedanto. Tiu fama violono estas subskribita Steiner', kvankam ĝi estas konstruita laŭ la procedo de Amati'.

El « Le Petit Méridional »

J. FIZE.

En Italujo.

La fama itala literaturisto, S^{ro} Gabriel d'Annunzio, verkis novan teatraĵon pri kiu sekvas mallonga analizo.

Piu che l'Amore (*Pli ol la Amo*) estas duakta dramo. Ĉiu akto daŭras proksimume unu horon kaj kvardek minutojn.

La heroo estas juna scienculo, Corrado Brando, kiu elfarinte sciencajn esplorojn kiuj ricevis kelke da sukceso, pripensadas pli gloran entreprenon, por kiu la registaro de lia lando promesis al li helpan monon.

Sed tial ke la registaro forgesis siajn promesojn, Corrado Brando, por havigi al si sukcesigajn rimedojn sin jetas en la aventurojn.

Li provas akiri riĉecon ĉirkaŭ la verda tapiŝo de monludejo. Li ludas ĉion, kio restas el li, kaj ĝin perdas. Fine, iom post iom, li kliniĝas al la krimo. Sed la horo por la ekspiacio eksonas; soldatoj kun karabenoj venas en lian hejmon por aresti lin. Sed Corrado, helpata de sia servisto Rudu, defendas kontraŭ ili la enirejon de sia domo. Li mortigas unu el la siegantoj, poste sin mortigas mem.

Al tiu temo sin alligas ama historio de la heroo por junulino nomata Maria'; kaj tiu historio pravigas la titolon: *Piu che l'Amore*!

JOHANINO FLOURENS.

Majstro S^t Saëns en Béziers'o.

La ĉi tica Granda Semajno Arto plena daŭras, kaj Béziers'o daŭras esti la ideala urbo de Orfeo: hieraŭ, 2^{na} de Septembro, oni solenigis la 70^{an} naskiĝan datrevenon de unu el la plej gloraj francaj muzikverkistoj, majstro S^t Saëns. La eminenta virtuozo kiu, dum la fino de Aŭgusto, ĉeestis en Salzburg'o la memorigajn festojn por la honoro de Mozart, bonvolis veni Béziers'on. En la Arenoj kie okazis kvarhora koncerto neforgesbla kaj neforgesinda li ludis per fortepiano. La delira entuziasmo de la dekkvin mil aŭskultintoj estis nepriskribebla, kiam ili estis ĵus aŭdintaj la majstron ludantan samtempe kun la neegalebla violonisto, Johannes Wolff.

JOHANINO FLOURENS.

FELIETONO

Poŝta Amo.

Hispana, de JOHANO MUNOZ KAJ PABO'N, Noveleto.
Tradukita de JOHANO GARCIA MARTIN, el Ubeda (Hispanujo). (*)

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Fraŭlino Marinjo. Sed pro ĉia honto, ĉi lasas min en la sama situacio. Ĉar ĉi estas tiel hontema (ĉi ja ne estus virino, se ĉi ne paradus pro tio), ĉu ĉi volas ke mi ŝparu al ĉi la ĝenon diri ĝin kaj ke mi havu, (kiel efektivaĝon) ĉian malvarman respondon al mia. *poŝtkarto*? Oni konstata ke ĉi nomas korespondanton de ĉia akademio *tiun*, kiu sonĝas je l' ofico de numerano; kaj vere mi haltigos mian penadon nur poŝt kiam mi estos atinginta ĝin.

6, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Ho! ve. Kia needukita infaneto ĉi estas! Novelisto ekvidus ĉe ĉi *karakteron*. Ĉi estas en ĉio pasia. Tie ĉi mi estas, ŝajne, la viro kaj ĉi estas la virino. Ellernu de mi esti kuraĝa kaj ne konstrui kastelojn en la aero (1) Ĉi estas nomita *korespondanta* ano de mia akademio, sed mi pensas ke ĉi ne farigos *numera* ano: Tio estos pli bone, ĉu ne vere?

8, VII, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Malfacila estas ĉia ekkaptado, kiel tiu de l'aglo, laŭ diro de Fernan' Kaballero, kaj ĉia retenado estas ankaŭ malfacila, kiel tiu de la serpento. Kiam ŝajnas ke mi estas ekkaptinta ĉin, rezultas ke ĉi estas forliberiginta kaj ke ĉi mokis min. Ĉi ankaŭ estas interesa *karaktero* por novelverkisto. Ĉi estas.. koketulineto. Ne koleru, mi petas.

10, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Senhontema sinjoro kaj malbona amiko. Iu ajn kolerus, sed ne mi. Kiu kulpigas min pri koketeco tiu ne estas ĉi, sed ĉia nevenkita memvolemo, kiu reaperas. Ĉia kontraŭaĵo al ĉiaj voloĵ frenezigas ĉin.... Ĉi devas malantaŭen iri al silabaro por edukado de ĉia volo. Alie, ĉi estos devigata forlasi por ĉiam mian akademion. Adiaŭ, dum la nuna tago.

12, VII, 1905.

MARINJO.

Al Fin Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Marinjo mia. Tio estas neelportebla. Mi ŝatas aferojn klarajn, kaj densan nur la ĉokoladon (1), kaj ĉi enkorpiĝas la ŝanceliĝon men. Je l' romo de tio, kion ĉi plej amas en la mondo, eltiru min el tiu ĉi purigejo, kiu estas nune mia vivo. Ĉu ĉi akceptas min, ĉu ne? Mortigu min unufoje; sed ne furiozu plu kontraŭ tiu malfeliĉulo.

14, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Karolo amiko! La diro pri la ĉokolado estas malŝataĵo ne kuireje sed literature. Lia advokata Moŝto devas paroli pli delikate. Aliparte l' akcepto de vi celata estus frenezaĵo. Kiel povus okazi ke ni akceptu nin reciproke, ne konante unu l' alian; eble rezultus, ke unu disrevigis la alian? Ĉi ja vidas: jam ĉi eĉ nescias, kiajn harojn mi havas!

16, VII, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Sed mi tion ne volas scii. Al mi sufiĉa estas ĉia animo, same kiel mi deziras ke la mia sufiĉu por ĉi, en tia maniero ke, kvankam mi havas mian fotograf-aĵon sur poŝtkartoj, ilin mi estas enmetinta en mian paperujon por pli bona okazo. Mi volas ke nia novelo rilatu nur al niaj animoj.

Du palmoj, jes, de l' vent' edzigitaj.

De l' vento, jes, du palmoj edzigitaj: jen estas tio, kion mi deziras ke estu niaj animoj, kiel dirus Kampoamor'. Tien sendas la sian...

18, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

S^{ro} Kampoamorano. Por ĉio ĉi estas trograndig-ulo! Por sola amikeco sufiĉe estas, vere, ke nur animoj sin komprenu reciproke; sed kiu sciigis al ĉi, ke por... (mi do ĝin diros), l' amo oni povas apartigi la korpon, kaj ĝian voĉdonon neadi en la elektado? Sed ĉi estas, mi rediras, tia trograndigulo, tia stranguleto por ĉio ke.... Jen prenu manbaton kiel punon; kaj relegu silabaron.

20, VI, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Konvinkite senpene pri tio, ke ni devas nin koni unu l' alian, jen mi sendas mian fotograf-aĵon. Sciigu al mi vian opinion pri ĝi; kaj diktu, se ĝi ne malplaĉos al ĉi, la temon de mia parolado por mia akcepto ĉe l' Akademio. Mi tre deziregas ekokupi la seĝegon. Adiaŭ, belulino mia.

22, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Mia togvestita (2) sinjoro. Multe mi bedaŭris, ke ĉi estu malobeinta al ĉiaj intencoj pri zorga gardado de ĉiaj fotograf-aĵoj kaj samtempe mi tre kondolencas, ĉar mi tian decidon kaŭzis per mia lasta poŝtkarto. Mi pensas ke mi nur diris al ĉi, ke por sola amikeco, kiel la nia, sufiĉas kaj eĉ troas nur la animoj. Sen-

(*) Sekvo. (Vidu *Nojn* 2^{an} kaj 3^{an}.)

(1) Hispana popoldiro: oni tion diras de tiu, kiu imagas efektiviĝi neblaĵojn; la Francoj en sama okazo diras: faire des châteaux en Espagne. (2) Alia Hispana popoldiro, kiu signifas ke oni deziras en ĉio klarecon kaj precizecon.

(2) Togo = Toge (fr.); Toga, germ.

dube ci alian dirajon komprenis, ĉar ci alsendis cian fotografajon. Ĝin altestime mi konservados tial ke ci estas alsendinta ĝin. Cia sincera amikino.

24, VII, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso *Ajnvilaĝo*.

Diabla amikino. Tie P afero haltis? Per la diabloj! Mia jam malmulte ĝenas tiom da ruzeco. Ĉu mia portreto ne estas simila je cia modelo? Se ci vidus kiom da flameco, grandeco kaj beleco entenas la koro, kiu batas pro amo al ci interne de mia korpo, kies figuraĵon ci konservadas kun la altestimo, kiu mian animon disŝiris per ĝia legado! Kompatu min, Marinjo mia. Ĉu ci ne kondolencas cian...

26, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Ne imagu, mi petas, Karolo, ke cia eksterajo malplaĉis al mi, kaj kvankam mi troestimas min por frazflati ian homon, mi diras kion diris la vulpo al la busto de la fablo: « Cia kapo estas bela »; ne estu malica: nenio pri... « sed ne saĝa... » Ĉu ci komprenas? Mi ja scias ke ci estas grandtalenta viro, kaj mi fieriĝas pro tio tute same, kvazaŭ li apartenus al mi. Tre varmega estas mia intereso por ci, tial mi penadis haviĝi sciigojn pri ci. Ci ja vidas kiel ci sukcesis interesi cian karan

28, VII, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Marinjo de mia koro! Mil dankojn pro cia intereso vivplena, kaj dankojn al tiu bona persono, kiu al ci alvenigis sciigojn pri mi. Nu do! Se mia eksterajo, laŭ cia diro, konformiĝas je cia idealo, ĉar bela ĝi ŝajnas al ci; se mia animo trovis ĉe la cia simpatiajn ehojn, kaj se la informoj, kiujn ci, per prudento de mi laŭdita, havigis, kontentigas cin; kial do ne submetiĝi al tiu jam ne vidita amo, kiu estas unuiginta niajn korojn? Ne batalu do plu kontraŭ ci mem, almenaŭ tial ke ci vundante cin, samtempe vundadas cian....

30, VII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Tre estimata Karolo. Informoj pri ci, kiuj estas fierigintaj min, rilatas cian talenton; la samon mi ne povas diri pri.. aliaj aferoj, kiuj ne malmulte min malĝojigas. Estas vere, ke mi ne havas la rajton cin devigi pensi tute same kiel mi pensas. Sed tiom min plezurigas se ci estus bona!...

Ĉu ne vere, ke estas tre postulema cia fidela amikino,

1, VIII, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Sed kiel mi estas? Ni do vidu. Ĉu mi forŝtelas? Ĉu mi kalumnias? Ĉu mi estas kartludanto, ebrulo, batemulo, aŭ... aliaĵo, kies ĉi tiea skribaĵo estus ofendinta cin? Kion ci volas, ĉarmulino mia, ke mi diru? Mi pensas ke, se ne sankta, almenaŭ mi estas honesta, nobla kaj filantropa viro. Mi ne estas malbona! KREDU al mi. Cia maljuste kulpigita,

3, VIII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Karolo amiko. Milfoje mi estas danka al Dio, tial ke ci ne estas malvirtulo. Sed mi estas tre postulema, kiel mi diris kaj virtoj nur neaj ne kontentigas min. Se ci ne aliĝos, ni neniam interkonsentos; kion aliparte tre bedaŭros mia koro pli inkliniĝinta al ci ol mi dezirus. Sed tiel ribelema la koro estas!... Iu ĝin kvietigas!

5, VIII, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Mia adorata, tre adorata via Moŝto Jakobino el Kadiz'o. Pli ol la koro estas ribelema, la intelekto kaj mi tute ne povas trudi al mi ion ĝin kontraŭirantan. Mi ja faras konsciencan ekzamenon kaj pri nenio malbona ĝi riproĉas min; kiel do povas esti ke ci kredas al mia malboneco? Difiu ĉiujn kulpigojn, eble mi konvinkiĝos pri miaj pekoj, kaj mi ne prokrastos tiam eĉ dum unu minuto mian pliboniĝon. KREDU, mi petas, al la praveco de cia kapitulacita,

7, VIII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Sed ci neniam konfesas kiel diris Margarito de Goethe al sia adorinda Faŭsto; kaj nekonesanto, almenaŭ unufoje ĉiujare, malobeas al ordonoj de rajtigita aŭtorito. Nur pro tia forlaso ci ne estas bona, ĉar tiel agi estas peko. Pardonu se mi vundas cin; sed mi ne cin amus, kiel ci meritas, se celante eviti malgrandan doloron, mi preterlasus la okazon bonfari al ci. Cin volas bona.

9, VIII, 1905.

MARINJO.

Al Fino Marinjo Lasso, *Ajnvilaĝo*.

Ho! ve. Mastrino de mia koro! Kiel ci ekkaptas la oportunan okazon. Ha! se Margarito... Tion do, per unu vorto, ci postulas de mi, kaj tia estas la kotizaĵo de cia amo. Iom kare ci ĝin vendas! Estas vere ke multe valoras, kio multe kostas. Ĉu ci ne povus iom rabati ĝian prezon, almenaŭ konsiderante kiel laŭ *Faŭste* vin adoras la agento.

11, VIII, 1905.

KAROLO.

Al S^{ro} Karolo Vergara, *Imagurbo*.

Oni ne povas eĉ unu centimon rabati, S^{ro} Don Faŭsto, ne eĉ « por esti por vi ». Sed tio estos ĝustatempe kaj nur kiam oni tien alvenos « per kalkulataj paŝoj ». Antaŭ ol oferi la volon, oni devas fari alian oferon de l' memoro. Tio estas l' intelekto, kion mi volas ke ci neniam oferu. Ĉu ci estas preta, pro amo al mi, iom turmenti cian memoron en la daŭro de kelkaj tajoj? Tia estas favoro al ci petata de cia kora,

13, VIII, 1905.

MARINJO.

(Daŭronta).

JOHANO GARCIA MARTIN,
(Hispanujo).

ESPERANTO, INTERNACIA PRAKTIKILO.

Internacia Marista Ekspozicio.

En 1907 okazos en Bordeaux granda Internacia marista ekspozicio. La grupo esperantista de Bordeaux deziras aranĝi esperantan sektion, kaj petas ĉiujn societojn, grupojn kaj individuojn, sendi al ĝi por tio ĉiujpecajn dokumentojn kaj propagandilojn (libroj, cirkuloj, poŝtkartoj, afiŝoj kaj objektoj kun la marko Esperanto). Por sciigoj oni sin turnu al S^{ro} Bignié, 66, cours Gambetta en Talence (Gironde), aŭ al S^{ro} Sam. Meyer, ŝipmakleristo en La Rochelle.

Tutmonda ligo por Kristana celado.

La unuan de Aŭgusto okazis, dum la tria tutmonda kongreso de la Ligo por Kristana Celado, oficiala kunveno por Esperanto; inter la ĉeestantoj troviĝis reprezentantoj el 17 diversaj landoj, preskaŭ el ĉiuj Eŭropaj landoj, el Nordameriko, Japanujo, Marshall Insuloj, Nova Zelando. Post entuziasmigaj raportoj de S^{roj} Rev. Horace Dutton, sekretario de la junula ligo en Eŭropo (angle), Ed. Privat, ĝenerala sekretario de la Dua Universala Esperanta Kongreso (france) kaj Fr.

Schneeberger, prezidanto de la Svisa Esperanta Societo (germane) la kunveno unuanime akceptis « Decidon », kiun proponis al ĝi S^{ro} Pastro D^{ro} Clark el Nordameriko, la fondinto kaj prezidanto de Tutmonda Ligo por Kristana Celado; nome:

« La reprezentantoj de la Ligo tutmonda por Kristana Celado multaj landoj, kiuj interesas sin pri la propagando de la lingvo internacia Esperanto, kaj kiuj estas konvinkitaj, ke ĝia disvastigado helpigos la universalan kristanan fratecon kaj progresigos tra la mondo la regnon de Kristo, rekomendas la ellernon de Esperanto al siaj ĝiaj fratoj en ĉiuj landoj, kaj petas la estrarojn kaj kondukantojn de ĉiuj naciaj unuigoj konsili kaj iniciati la akiron de tiu ĉi nova ligilo, kiun kunigas niajn korojn en amo kristana. »

La Tutmonda Ligo por Kristana Celado havas preskaŭ 70,000 grupojn lokajn kun pli ol 4 milionoj da anoj; tial la decido estas grave sukceso por Esperanto.

FR. SCHNEEBERGER.

Prez. de « Svisa Esperantista Societo »

Malgrandaj nekomercaj anoncetoj.

Por plenumi peton de kelkaj Samideanoj, ni plimalgrandigis la koston de niaj nekomercaj anoncetoj:

Ĝi estas nun 1 fr. 25 por kvarlinia anonco (33 literoj en ĉiu linio). Ĉiu plua komencita linio kostas 25 cent (Pageblaj poŝtmarkoj).

Oni bonvole skribi legibla kaj sur aparta papero.

15. — Guvernantoj francaj, anglaj kaj germanaj, dezirantaj ricevi okupon en Rusujo, povas sin turni al la aprobita de l' Ministerio Rekomenda Kontoro de Wasilewski, Marszalkowska 123, en Varsovio.

18. — S^{ro} Arthur E. Baker, General Delivery, Oklahoma, Okla., U. S. A., deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun samideanoj de ĉiuj landoj. Ĉiam kaj tuj respondos. Ĉiuj kartoj senditaj estos uzataj por disvastigadi la lingvon.

19. — S^{ino} Steenbuch, Sumoto, Awaji, Japanujo, interŝanĝas poŝtkartojn. Deziras nur bonfaritajn portretojn kaj famajn pentraĵojn. Sendu en koverto kiel presajo.

20. — S^{ro} Benjamin C. Camozato, P. Alegre, Rio Grande do Sul (Brazilo), deziras interŝanĝi p-k. esperante skribitajn.

21. — S^{ro} J. Boss, profesoro ĉe la Liceo en Quimper (Finistère-France), deziras korespondadi kun nefrancaj geesperantistoj per ilustritaj poŝtkartoj, sed precipe per leteroj.

22. — S^{ro} J. H. Salomon, 2 St. Stephen's Gardens, Twickenham (Anglujo), deziras interŝanĝi kun personoj okupigantaj pri la tabaka denando kaj kapablaj lin. sciigi kion, en ilia lando, la ŝtatestro faris aŭ intencas fari por ekstermi la junulan tabakuzadon.

Malgranda Korespondado.

S^{ro} Adinarayana Chettiar (Hindujo). — Mi ĝojis por niaj legantoj, eksciante ke vi ne forgesis vian afablan promeson.

Noj Perditaĵoj de la poŝto. — Ni ĝin scias per sperto, « Tra la Mondo » plaças al peruloj, kies devo estus ĝin transsendi honeste. Ŝajnas ke la kongresa numero estis speciale ŝatata, ĉar ni ricevis pli da plendoj pro nericevo, ol de la komenco de nia eldonado.

Ĉar mi mem, ĉe Genève, tuj post la fino de l' kongreso, sendis la revuon al la Svisoj kaj Francoj, mi estas certa ke neniam eraro nek forgeso okazis.

Do la numeroj nericevitaj en la cititaj landoj estas certe perditaĵoj per poŝto — ĉu deira, ĉu alvena — aŭ per pordistoj. La zorgo de eldonisto ebligas certigi same pri la Noj senditaj de Bruges.

Denove ni konigas ke, ne pli ol naciaj organoj, kaj aliaj esp. revuoj ni ne povas akcepti respondecon pri tiaj perdoj. Ni povas nur tamen multe ilin bedaŭri, kaj forte instigi tiujn, kiuj ne ricevis la 2^{an} Non (Nun) jaro) kaj deziras havi tiun belegan 24 paĝan kajeron, ĝin mendi per letero akompanata de 75 centimoj poŝtmarkoj.

A. M. S^{ro} Wasilewski (Polujo). — Ministerio ekzistas en neniuj vortaro.

Esperantaj Bildaroj.

Por helpi al la propagandistoj, la Fermo HACHETTE k. K^o ĵus eldonis serion da bildaroj (25 malsamaj numeroj), tute en Esperanto, por infanoj.

Ni longe parolis pri la graveco de tia eldonado, kiam aperis la 4 unuaj bildaroj, presitaj de la fama firmo Pellegrin, en Epinal, laŭ instigo de nia fervora amiko Ducommun, kiu tradukis Esperantan la tekstojn.

Ni do ne bezonas denove insisti pri tiu punkto, kaj ni varme rekomendas al niaj legantoj tiun ĉi novan kaj tre malmultkoston propagandan rimedon. Per ili, ankaŭ, la profesoroj facile povos paroligi siajn lernantojn (ekz. priskribigi ĉiun bildon). La Bildaroj estas aĉeteblaj en ĉiuj librejoj kaj papervendejoj.

Tra Oberland Berna

ILUSTRITA GVIDLIBRETO

de TH. HOPF, Apotekisto, Adelboden

aĉetebla ĉe OSCAR HOPF, Thun

svisa esperanta eldonejo.

(Prezo 50 centimoj).

ANGLA-ESPERANTA LERNEJO POR KNABINOJ.

Tutjarloĝantinoj. Fraŭlino EVERDELL L.L.A.

College House,

Bridgwater, Somerset, Anglujo.

— Korespondas Esperante. —

100 bonmiksitaĵoj japanaj poŝtmarkoj, 1,50 fr.

Steenbuch, Sumoto, Awaji, Japanujo.

FERVOJOJ de PARIS ĝis LYON kaj LA MÉDITERRANÉE

Rilatoj inter PARIS, BÉZIERS, la Sudo de FRANCUJO kaj HISPANUJO

1^o Per Arvant-Neussargues :

(Veturiloj senŝanĝaj 1^a-, 2^a-, 3^a- klasaj inter Paris kaj Béziers).

Paris — deiro	8 h. 15 vespere	Béziers — deiro	9 h. 20 matene
Arvant — alveno	5 h. 35 matene	Arvant — »	8 h. 10 vespere
Béziers — »	3 h. 20 vespere	Paris — alveno	5 h. 36 matene

2^e Per Lyon — Cette :

(Veturilo senŝanĝa salon-lita 1^a- kl. inter Paris kaj Cerbère — rapida vagonaro 1^a-kl.).

	1 ^a , 2 ^a , 3 ^a kl.	1 ^a kl.		
Paris — deiro	9 h. 20 vesp.	9 h. 20 vesp.	Valence (Hispanujo) deiro	6 h. 45 vespere
Avignon — alv.	6 h. 57 mat.	7 h. 53 mat.	Barcelone »	10 h. matene
Cette alveno	10 h. 50 mat.		Cerbère »	2 h. 23 vespere
Béziers »	tagmeze 19		Béziers »	5 h. 18 »
Cerbère »	3 h. 01 vesp.		Cette »	6 h. 45 »
Barcelone »	7 h. 26 »			
Valence (Hispanujo) »	9 h. mat.			
			1 ^a kl.	1 ^a , 2 ^a , 3 ^a kl.
			Avignon — deiro	9 h. 45 vesp.
			Paris — alveno	8 h. 30 mat.
				10 h. 19 vesp.
				10 h. 25 mat.

Gazetaro.

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per esperanta Braille-sistemo. 3 f. — Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Espero Katolika. — Tute esperante. Unu N^o afrankita 0f. 50; Francujo, 4 fr.; aliande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 frankoj. Sin turni al S^o Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Juna Esperantista. — Tute Esperante. Divstigo de Esperanto ĉe la junularo — 2 fr. 50. — Redakcio: 9, Avenue des Vollandes, Genève (Suisse); Adm. 33, Rue Lacépède, Paris.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Bould St-Germain. Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7.

Lingvo Internacia. — Duonmonata esperanta revuo. Fondita en 1895. Literatura kaj propaganda tute en Esperanto. Abono 7,50 fr. ĉiulande. Unu numero 0 f. 50. Abono estas akceptata de l' komenciĝo de ĉiu monato.

Unua Paŝo. — Monata bulgara gazeto en Esperanto. Priraktas speciale bulgaraĵojn: morojn, literaturon, k. t. p.: jare, 3 fr.; duonjare, 2 fr. — Ĉe S^o S. Petkov, 26, Strato San-Stefano, Sofia, Bulgarie.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj esperante. — Organo de la Perua esperantista societo — 3 fr. — Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras ĉiunonate. Abono: 4 fr. jare. Kolektoj de antaŭaj jaroj: 6 fr. Ĉe J. Coox, Duffel, (Belgique) kaj ĉe *Tra la Mondo*.

The British Esperantist. — Oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio; 12 paĝoj da novaĵoj, k. c., anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono 2 fr.) — Ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

L'Espérantiste. — France kaj esperante redaktata, oficiala revuo de la SfpE: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; aliande: 3,50 fr. Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stokolma Klubo. Tre subteninda por helpi esperantistan movadon en Svedujo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare; aparta N^o: 35 cent.

Nia kunlaboranto J. H. Salomon, fondis « Korektadan korespondantan Klubon » kun la celo pliperfektigi per reciproka korektado. Ĉiuj kiuj deziras iĝi membroj de l' klubo (enira rajto: 1 frankon) bonvolu sin turni al S^o J. H. Salomon 2, St. Stephen's Gardens, Twickenham, England).

Esperanto. — Hungare kaj esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. ĉiulande. Ĉe S^o Marich Agoston, Papnövelde-Uteza 6, Budapest, IV. (Hungarujo).

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark Marque déposée
N^o 270,042 N^o 13,195
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & C^o
GARTHLAND STREET,
GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaj (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebligantan tuj kaj senprepare decifri kaj legi ĉion esperante skribitan » Emmetablaj en leteron sen pligo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, germana, franca, ilala, sveda, hispana eldonoj kaj riceveblaj po
3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;

1 f., afrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo »

fr. 1,50 ĉiu cent.

ĈE « TRA LA MONDO ».

Ilustritaj poŝtkartoj propagandaj.

kun belaj vidaĵoj eltiritaj de

« TRA LA MONDO ».

La serio (6 kartoj), afr.: 0 fr. 40 c.

5 serioj (30 k.), afr.: 1 fr. 50 c.

10 serioj (60 k.), afr.: 2 fr. 50 c.

15 serioj (90 k.), afr.: 3 fr. 75 c.

Rekomendo: 0 f. 10 c. aŭ 0 f. 25 c. plue

Pageblaj poŝtmarke aŭ monopapere.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiunonate). Redaktata germane kaj esperante. JARABONO: 3 f. 75 Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel, Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiunonata organo de la S-to « Espero » Esperante kaj ruse — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo: artikoloj pri la problemoj de la lingvo internacia kaj pri Esperanto; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio; novaj famaj beletristikaj, versaĵoj kaj mult. al. — Detalaj prospektoj riceveblaj, senpage. — Jara abonpago (kune kun membriĝo en la S-to « Espero ») — 3 rubloj (7 fr. 50 cent.) — Adreso: Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S-to « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj esperante. Abono 3 fr. Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj esperante — 2 fr. — Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. — 15, rue St-Georges, Paris. Abono: 10 fojojn repagita per la profitoj de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro} L. P. Canet, Adm., 15, Rue Maigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literatura kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

Mortintaj revuoj.

Ni havas denove enregistri la morton de revuoj: « Revuo de Esperanto » kunfandiĝis kun « Esperanto-Journal »; « Alĝeria Stelo » estas ankoraŭ devigita ĉesi sian eldonadon pro nesufiĉeco da legantoj.

La malapero de tiuj organoj estas tre atentinda leciono por niaj grupestraroj: Nenio povas anstataŭi la nacilingvajn propagandajn organojn. Ĉiu alia oficiala organo de grupo estas antaŭdediĉita al morto certa, ĉar ĝi ne povas konkurenci, pri la propaganda fako, la speciale propagandajn revuojn, al kiuj iras ĉiuj sciigoj interesaj kaj kapablaj impresi la publikon kaj konservi la grupanojn.

Eĉ la grupoj la plej brilaj — sur la papero — ne estas kapablaj vivi folieton devige seninteresan; precize tial ke, pro la manko mem de intereso de sia oficiala organo, la grupanoj rapide perdas emon al afero, kies progresojn li ne konas, kies utileco ne estas montrita al li!

Tiu nova eksperimento instigu la grupestrarojn subteni niajn propagandajn organojn, t. e.: « la nacia Esperantisto » en sia lando.

Legu en « L' Annonce philatélique », n^o 69-70, anoncon pri *Internacia interŝanĝo Esperanto*, nova rubriko malfermita en tiu ĵurnalo (Sin turni al Annonce philatélique, 10, Rue St-Dominique, Troyes. Unu numero 10 c.)